


ESPERANTO



L. L. ZAMENHOF (1859-1917)

N-ro 605 (4)



Aprilo 1956

REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 605 (4)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Arangoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: W. AULDKnockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represaĵon al nia redakcio.Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duobla vorto.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

E. Malmgren, prezidanto, Heleneborgsgatan 6,
Stockholm, Svedujo.Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Bri-
tujo.D. Kennedy, vic-prezidanto, 21 Westfield Road,
Bishop Auckland Co, Durham, Britujo.P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Pytha-
gorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales),
Francujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

E N H A V O

Rubrikoj

La eterna saĝo de L. L. Zamenhof	57
Vizito al la hejmo de Zamenhof. <i>Nora Holmes</i>	60
Al la Majstro. <i>J. Korinek</i>	60
Pri dana mitologio. <i>C. Graversen</i>	62
Vagado sub palmoj (9). <i>J. Ribillard</i>	65

C.E.D.	61
41a U.K.	61
Radio	68
Radio-Babiloj (5)	69
Internaciaj Konkursoj 1956	69
Nia Forumo	70
Oficiala Informilo	71

ANTAŬ precize 39 jaroj, en mondo freneziga, mortis stature malgranda sed spirite grandioza pollanda okulisto, kiu dediĉis sian tutan vivon al la problemo de la paco kaj interhoma kompreniĝo. Pri la genio de L. L. Zamenhof ne povas ekzisti dubo: ĝi montriĝis per la fakto, ke li kreis la internacian lingvon, vivigis ĝin, kaj sukcesis trovi rimedojn por ebligi ĝian disvastigon tra la tuta Eŭropo, kaj la tuta mondo, en mirinde mallonga tempo. Sed ĝi montriĝis ankaŭ per lia klarvido en ĉiuj cirkonstancoj, kaj lia aplomba retenado de ekvilibro kaj prudento en la plej krizaj momentoj. Neniam li ĉesis iri la ĝustan vojon; kiel multaj kvietaj, modestaj homoj, li havis fortan, obstinan volon, kiun pli bruaj temperamentoj ne povis ŝanceli, kiam li estis certa pri la pravo de iu principo. Neniu povis lin fortimigi aŭ per ĉantaĵoj forturni. Neniu povis, eĉ per plej subtilaj klopodoj, lin subaĉeti, malgraŭ la malfacileco de lia persona situacio. Li estis plej nobla homo, absolute dediĉita al la interesoj de nia afero. Kaj tamen inter liaj adeptoj ne mankis enviuloj kaj klaĉuloj, kiuj volis atribui al li motivojn neindajn kaj al lia animo tute fremdajn. Kiam, en 1901-1903, li subskribis kontraktojn kun la eldona firmao Hachette — ĉar li esperis, ke la subteno de tia granda firmao alportos utilon kaj forton al la Movado — kelkaj individuoj parolis pri ia „mistero“, kaj plendis, ke la iniciatinto de Esperanto (kiu sin finance ruinigis per siaj senĉesaj oferoj por la lingvo) deziras profiti el sia verko! La trankvila konscienco de Zamenhof permesis al li digne montri al tiuj personoj ilian eraron. Tute ne ekzistis ia „mistero“ ekster ilia propra fantazio:

Multaj pensas, ke la kontrakto donos al mi la eblon riĉiĝi. Efektive, la intenco de la iniciatoroj de la kontrakto estis interalie ankaŭ plibonigi iom mian financon situacion, kiu tute ne apartenas al la plej brilantaj. Sed eĉ se efektive la tuta privata kontrakto inter mi kaj Hachette (kontrakto kiu ligas nur min kaj neniun alian) donus al mi la eblon iam riĉiĝi — ĉu mi tiam devus antaŭ iu pravigi min? Se mi memvole forĵetis de mi ĉiujn rajtojn de kreinto kaj mastro, mi tamen ne estas ia krimulo, kiu devas havi malpli da rajtoj, ol ĉiu alia esperantisto kaj kiu ne havas la rajton disponi je sia propra persono kaj siaj personaj laboroj. Sekve se la kontrakto eĉ efektive donus al mi la eblon iam riĉiĝi, mi antaŭ neniun bezonus min pravigi pri tio ĉi. Sed la malkontentuloj povas esti trankvilaj: malgraŭ la plej bonaj intencoj de la iniciatoroj, la plibonigo de mia financa situacio per la kontrakto estas tiel duba (almenaŭ laŭ mia opinio), ke mi

tre nevolonte akceptis la kontrakton, kaj post tre longa ŝanceliĝado mi decidis subskribi la kontrakton nur tial, ĉar mi konvinkiĝis, ke ĝi alportos grandan utilon al nia afero. — „Lingvo Internacia“, 1903.

Esperantistoj . . .

La personeco de tiu homo, kiu, malgraŭ sia modesta rifuzado de tia titolo, fariĝis la „kara Majstro“ de la esperantistaro, vekis (kaj ĉiam denove vekas) reeĥon en la animo de aliaj bonaj homoj, tiel ke, sub la influo de Zamenhof kaj lia idealo, ankaŭ ili ludas sian sindonan rolon por la afero Esperanto. Ili estas sennombraj. Unu el ili estis Trompeter. En decembro 1891 Zamenhof, pro manko de rimedoj, estis devigata, vole-nevole, ĉesigi — aŭ, kiel li preferis diri, „interrompi“ — la eldonadon de la „Esperantisto“. Li bone sciis, ke tio estus eble mortobato al nia ankoraŭ malforta afero. Sed feliĉe:

Tiam kun helpo aperis sinjoro W. H. Trompeter. Li ne sole prenis sur sin la eldonadon de nia gazeto, ne timante ĝian deficiton, sed li ankoraŭ difinis salajron de 100 markoj ĉiumonate al la redaktoro, por ebligi al li pluan laboradon por nia afero kaj por ĝia organo, la „Esperantisto“. Tiam la unuan fojon nia afero ricevis teron sub la piedoj. Ĝi komencis regule disvolviĝadi, kaj ĝi nun eble starus jam tre alte, se ne estus aperintaj kelkaj nuboj, kiuj paralizadis la tutan energion de niaj amikoj; ĉiam pli densiĝante, la nuboj en la pasinta jaro solviĝis per fulmotondro, kiu, minaca en la komenco, montriĝis en la fino tre bonfara, ĉar ĝi per unu fojo (dank' al la Novembra decido de la Ligo) purigis la atmosferon kaj donacis al ni pacon kaj lumon por longa tempo. Liberigita de demandoj internaj, nia energio povas nun en plena tuteco turniĝi eksteren, kaj por nia afero komenciĝis nun nova tempo de jam senhalta kaj senmalhelpa progresado. „La Esperantisto“, 1895.

. . . kaj Pseŭdoesperantistoj

Aliaj personoj, logitaj al la internacia lingvo kaj ĝia idealo, tamen malhavis fidon kaj obstinon, kaj ili baldaŭ laciĝis kaj forfalis. Tio estis neevitebla. Sed kelkaj el ili estis tiel malspritaj, ke ili skribis al Zamenhof, petante lin sendi al ili „de tempo al tempo... ian novaĵon pri Esperanto“, por ke ili „ne tute forgesu pri ĝi“, kaj promesante realiĝi al la afero kiam la „surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos“, ktp! Pro tiaj malsaĝaĵoj finfine eĉ la milda temperamento de Zamenhof eksplodis:

Ne vere, amikoj, kia edifa kaj grandanima maniero de pensado? kiam dank' al niaj senlacaj,

paciencaj kaj malfacilaj laboroj nia ideo venkos, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj, post la eternaj ĉagrenoj, malagrablaĵoj kaj moko, levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, tiam sinjoro X. tuj aliĝos al ni kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj batalantoj! Dume „la mondo ne estas ankoraŭ matura” kaj tial s-ro X. en tia grado ne povas esti „aktiva esperantisto”, ke li ne povas eĉ . . . por sia propra persono aboni la „Esperantiston”, kiu „havas por li ĉiam grandan indon”, kaj sian aldonitecon al nia afero li esprimas per tio, ke li petas nin, havantajn tro multe da libera tempo, skribadi al li de tempo al tempo letere pri la stato de nia afero.

Ne, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkas. Sed kiam dank’ al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti „fantazio, pri kiu la bona tono postulas, ke oni ĝin moku, ne esplorinte ĝin”, kiam Esperanto estos ĉie akceptita kaj sankciita, — tiam ni vin ne bezonos, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj.

Vi faris malgrandan proveton de laborado, kaj kiam ĝi restis sen deca sukceso, vi tuj ĉesis! Sed se nia laborado apartenus al tiuj dankportaj aferoj, kiuj estas kronotaj de tuja granda sukceso tiam ni ja facile trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonus! Vi ĉiuj (via nombro estas jam tre granda), kiuj staras nun kaŝite kaj atendas, — ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn. Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi nun, kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan bataladon; staru forte kaj nekaŝite, kiel granito inter ondoj, nun, kiam la malfavoraj cirkonstancoj tion ĉi postulas; oferadu malavare nun, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon: „esti aŭ ne esti”. — „La Esperantisto”, 1893.

La Interna Ideo

Ke Zamenhof estis eminente praktika persono atestas lia verko mem, kaj lia agado kaj liaj leteroj kaj artikoloj. Sed, kiel multaj poetoj kaj viziuloj, li havis krom praktika kapableco ankaŭ idealismon en granda kvanto. Ĉiuj grandiozaj atingoj de la homa menso rezultiĝis de ies vizio kaj arda idealismo, kaj Zamenhof ĉiam prave insistis pri tiu flanko de la internacilingva movado, sen kiu ĝi mortnaskiĝus kaj neniam disvastiĝus:

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭ-

zataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: „Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantiston kun ia ideo, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!...” Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forjetos malproksimen la verdan steilon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur el celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!” — Parolado en la Dua Kongreso, 1906.

Praktika Esperantismo

Sed la adeptoj, inspiritaj de tiu interna ideo de la lingva movado, devas praktike labori por la realigo de la idealo. Pri tiu laborado Zamenhof senĉese donis konsilojn. Ekzemple, li difinis la bazan devon de ĉiu esperantisto aboni al sia centra organo:

Nia nuna gazeto ne aperas kiel io nova, partia, kiel kelkaj en la komenco pensis; ĝi estas — kvankam sub alia redakcio — pura daŭrigo de la gazeto antaŭa; ĝi prezentas nian komunan, tre bone redaktatan centran organon, kaj mi varmege rekomendas ĝin kiel unuan kaj plej necesan objekton por niaj amikoj. Ĉion alian niaj amikoj povas fari aŭ ne fari; sed kiu ne abonas nian standardon, la „Lingvon Internacian”, tiu ne estas esperantisto. — „Lingvo Internacia”, 1896.

Li, kiu tuj post la naskiĝo de Esperanto ĝin „fianĉigis al la poezio”, kiel skribis iam Kalocsay, komprenis senkompromise la absolutan valoron de literaturo al la internacilingva afero. Nia literaturo havas gravecon internan, ĉar de ĝi dependas la iompostioma disvolviĝo de la lingvo mem; sed eĉ pli ĝi havas gravecon eksteran, kiun Zamenhof difinis unu fojon por ĉiam:

Kiu legas la motivojn, kiujn la indifera mondo, precipe la instruituloj-teoriuloj, elmetas kontraŭ nia afero, tiu rimarkis, ke la plej ofta kaj eĉ preskaŭ la sola ŝajne peza batalilo, per kiu oni volas nin neniigi en la okuloj de la mondo, estas la opinio, ke nia lingvo estas ia nenatura kreitaĵo, malriĉa kaj nefleksebla, kiu „taŭgas nur por esprimi apartajn mallongajn pensojn, por rilatoj poŝta-telegraŝaj, por lama rimedo en alilandaj hoteloj k.t.p., sed neniam povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo”. Kontraŭ tiu ĉi senfundamenta opinio, kiu en la praktiko estas nia plej grava malamiko, ni povas batali nur per faktoj, nur, nur kaj nur per riĉigado de nia literaturo. La batalantoj

por nia afero jam longe konvinkigis, ke ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj. — „La Esperantisto”, 1895.

Pri la teĥnikaj vortaroj li skribis:

Venis jam la tempo ellabori detalajn teĥnikajn vortarojn de nia lingvo por ĉiuj sciencoj, profesioj, sportoj k.t.p. Tiujn ĉi vortarojn devas ellabori nepre specialistoj, ĉiu en sia specialeco. Por ĉiuj, kiuj posedas ian specialon kaj konas ankaŭ bone nian lingvon, tiu ĉi laboro estos tute ne malfacila; ili agas erare, se ili atendas tiajn vortarojn de mi. Se mi, kuracisto, volus verki detalan teĥnikan vortaron ekzemple por inĝenieroj aŭ por brandfaristoj k.t.p., mi kreus nur sensencaĵon, dum ili, ĉiu en sia specialeco, kreos tre bonajn detalajn vortarojn, eĉ se ili nian lingvon posedas ne tute perfekte. — Lingvo Internacia, 1896.

Pri Neŭtraleco

La fina grandioza celo de Esperanto estas, forigi la lingvajn barojn inter la diversaj gentoj kaj popoloj, kaj ebligi tiun reciprokan kompreniĝon, sen kiu paca kunvivado de homoj kun diversaj religiaj kaj politikaj starpunktoj estas tute, aŭ preskaŭ, neebla. La esperantistoj, kunligitaj per lingva ideo kaj per idealo pacema, estas tre diversaj, eĉ kontraŭaj, laŭ siaj mondkonceptoj kaj vidpunktoj; kaj tamen pro sia esperantismo ili harmonie kunlaboras kaj renkontiĝas por komuna celo. Por ke tia vere mirinda kaj pensinda situacio estu ebla, necesas granda toleremo. Kaj necesas ankaŭ neŭtraleco en la kadro de la Movado rilate ĉiujn demandojn religiajn kaj politikajn; fakaj organizaĵoj ludas sian rolon, sed en pli larĝaj kadroj ĉiu devas respekti nepran neŭtralecon:

Vi ofte aŭdis pri la neŭtraleco de niaj kongresoj. Jes, neŭtraleco estas la ĉefa principo de niaj kongresoj; sed oni devas ĝuste kompreni la sencon de tiu ĉi neŭtraleco. Neŭtraleco ekzistas en ĉiuj internaciaj kongresoj; sed dum tie la neŭtraleco estas simple afero de takto, ĉe ni ĝi estas la ĉefa principo, ĉe ni la neŭtraleco, aŭ pli ĝuste la neŭtraligo de la intergentaj rilatoj estas la tuta enhavo, la tuta celo de niaj laboroj. Tial ni neniam devas paroli en niaj kongresoj pri aferoj speciale politikaj, kiuj apartenas al la diplomatoj, aŭ pri aferoj speciale religiaj, kiuj apartenas al la ekleziuloj kaj filozofoj, — ĉar la verda standardo malpermesas al ni fari ion, kio povus ofendi tiun aŭ alian genton aŭ religian grupon; sed ĉio, kio, neniun ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe, ĝi devas esti ĝuste la esenco de niaj kongresoj, ĉar ĝi apartenas al la verda standardo... Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro,

kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj. — Parolado en la Tria Kongreso, 1907.

Pri Disciplino kaj Konkordo

La Movado devas esti neŭtrala, kaj ĝin regas demokrataj principoj; ĉiujn demandojn decidas voĉo de la plimulto. Sed ne ĉiam oni volis akcepti tian demokratian decidon!

Sed nun kelkaj personoj, pro tiu aŭ alia kaŭzo, komencis bataladon kontraŭ la Lingva Komitato. Forgeante, ke la esperantistoj ne estas infanoj, kies komunan publikan decidon oni povas senceremonie nuligi, ili penas renversi tion, kion kreis la kongresoj, kaj per flanka agitado krei ion novan! — „Lingvo Internacia” kaj aliloke, 1908.

Pri la neceso de disciplino kaj akcepto de plimulta decido Zamenhof devis pli ol unu fojon emfazi. Li klare vidis, ke, por ke la afero venku, necesis antaŭ ĉio unueco kaj glata kunlaborado:

Sed la plej grava, kion ni ĉiuj devas kunporti kun ni al la kongreso, estas paco kaj reciproka amo kaj toleremeco. Se ni deziras, ke nia kongreso ne faru fiaskon, ni devas antaŭ ĉio aperi al la kongreso ĉiuj kiel fratoj, entuziasme kaj sindone ligitaj per unu amata ideo, kiu devas esti por ni, almenaŭ en la tagoj de la kongreso, pli sankta ol ĉiuj diversaj personaj ambicioj, kalkuloj, kapricoj aŭ opinioj. Ĉiu el ni kredeble havos la eblon esprimi en la kongreso sian opinion pri tiu aŭ alia punkto, sed ĉiu devas tion ĉi fari trankvile kaj senpase kaj ne batali kontraŭ la decidoj de la plimulto; neniuj devas peni altrudi sian opinion aŭ volon, neniuj devas koleri, se lia opinio ne estos akceptita. Se troviĝos inter ni persono, kiu profanas nian feston per persona ambicio aŭ per semado de malpaco, ni ĉiuj deturnos nin de li, se li eĉ estas homo de plej grandaj meritoj. — „Lingvo Internacia”, 1905.

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cede de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava”. Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo

havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperos io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan

periodon de nia historio, en la duan kvaron-jarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo”. — Parolado en la Oka Kongreso, 1912.

La internacia lingvo estas afero grandioza. Ĝi estas tiel grandioza, ke nur la esperantistoj mem povus ĝin detrui! Dum la movado laboras sub la devizo „Konkordo”, ĝi antaŭeniras nerezisteble, kaj iam ĝia celo estos atingita. Tiu devizo, do, neniam forviŝiĝu de nia standardo!

Vizito al la hejmo de Zamenhof

Dum la Ora Jubilea Kongreso en Varsovio dum 1937 mi havis la plezuron viziti la urbon Bialystok kaj tie vidi la domon kie D-ro Zamenhof naskiĝis. Mi grimpis la eksteran lignan ŝtuparon kaj staris en la tre malgranda ĉambro kaj pensis pri la modesta komenco de vivo kiu riĉigis la mondon kaj ankoraŭ nun estas fonto de inspiro al ĉiu kiu celas al homa amikeco. La domo bedaŭrinde ne plu staras spite la klopodojn de la polaj esperantistoj tiutempaj.

Kontraste, je la lasta vespero de la Kongreso, mia edzo kaj mi ricevis inviton al la apartamento en bela parto de Varsovio kie laste vivis Zamenhof. Pro nescio pri kutimoj, ni pekis kaj prezentis nin je la horo de invito, anstataŭ tridek minutojn malfrue kiel estas la pola kutimo. Sed mi ĉiame dankos al la angla akurateco ĉar dum tiuj tridek minutoj antaŭ ol la aliaj gastoj komencis veni ni havis la feliĉon rigardi la belaĵojn per kiuj diversaj registaroj honoris la kreinton de nia amata lingvo. Ni vidis la orajn medalojn, pentraĵojn kaj pokalojn, kaj respektplene fingrumis la aliajn objektojn de honoro. Kiel bedaŭrinde estas ke, pro la granda fajro dum la milito, nenio restas al la novaj samideanoj por tiel trafe montri al ili kiel mondfama fariĝis la modesta Doktoro. Doktorino Sophie Za-

menhof diris ke la ĉambro kie la Majstro laboris ĉe la skribtablo estis malmulte ŝanĝita, kaj la sentemulo povus facile rekapti la tiaman atmosferon.

Tute moderna estis la monstro de filmoj faritaj de D-ro Adam Zamenhof dum la „Tra Aŭstrujo” ekskurso post la Viena Kongreso, en kiuj ni vidis nin sur la ekrano. La muzikon kaŝe provizis D-ino Sophie per gramofondiskoj de la malluma kabineto normale uzita por ekzameni la okulojn de pacientoj. En taŭgaj momentoj ŝi enmetis tirolan krion, sen pola akcento.

Poste sekvis luksa festeno en kiu partoprenis famaj kaj pioniraj esperantistoj inter kiuj ni sentis nin nur infanoj en la movado.

Ĉar ni devis trafi vagonaron, D-ino Wanda Zamenhof petis nin foriri laŭ la „angla” maniero kaj, do, preskaŭ post la lasta ebla minuto, mia edzo staris kaj pardonpetis pro nia foriro. Tuj ni konstatis nian eraron ĉar ĉiu movis sin por adiaŭi nin. Feliĉe la situacio estis savita per kelkaj vortoj de D-ino Wanda, sed ni konstatis ke ni la duan fojon pekis ke ni ne ŝtele foriris. Tamen, kiel afable la juna Ludoviko kondukis nin al aŭto kaj adiaŭis la nesciantajn anglojn, kiuj veturis for kun amdankoj en la koroj pro enviinda vizito.

La sekvantan matenon ni rakontis nian embarason al amikino en Berlino kiu eksplode ridegis kaj diris ke, en Germanujo, foriri ŝtele estas laŭ la „pola” maniero.

Al la Majstro

*Ne venas ni en blinda kulto
al tiu glora nomo
brilanta el la sangtumulto
de l'histori' de homo,*

*por antaŭ Majstro nin ekklini,
soleni amuziĝe,
kaj veran sencon ne difini,
kredante superstiĉe.*

*Ni volas korojn levi alten
en klara ekkonscio,
ke el jarcentoj kvazaŭ salte
aperas jen genio.*

*Kiam la tempo ekmaturis
por lia voka signo
rompi la murojn, kiuj turis
ofende por homdigno*

*miljarojn inter la popoloj
de unu sama tero,
li kun aref' da apostoloj
elpaŝis kun espero.*

*Li kreis lingvon por kompreno
kaj komprenemon semis,
kaj lia verk' per Dia beno
jardekojn persistemis.*

*Ne langoj nur per ĝi parolu,
deziris Majstro kara,
sed pli la kor', en kiu bolu
sent' home solidara,*

*ĉar per la lingvo eblas krimi
kaj per la vorto murdi,
samkiel amon vortesprimi
kaj al mensogo surdi.*

*Sekvante Majstron, korojn niajn
kunforĝu ni je ponto
al tagoj novaj harmoniaj
promesaj en estonto.*

Nora Holmes

Jiri Korinek

CED

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

UZO DE ESPERANTO EN SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ PERIODAĴOJ

La kunlaboranto de CED D-ro W. P. Roelofs entreprenis antaŭ pluraj monatoj enketon pri la uzo de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj periodaĵoj. La rezultojn de tiu tre grava enketo, kiu montras la utiligon de la Internacia Lingvo por sciencaj kaj teknikaj celoj en diversaj revuoj nur esperantlingvaj aŭ nacilingvaj kun artikoloj aŭ resumoj en Esperanto, li publikigis en *Scienca Revuo*, n-ro 4/1955. La tre klara tabelo kun precizaj indikoj pri la periodaĵoj, klasigitaj laŭ la UDK, montras, ke preskaŭ 100 diversaj sciencaj kaj teknikaj revuoj kaj aliaj periodaĵoj publikigas fakajn artikolojn aŭ resumojn en la Internacia Lingvo. En la akompana artikolo D-ro Roelofs interalie diras:

„La sciencistoj esperantistaj komprenu, ke ju pli da artikoloj en Esperanto aperas en la scienca kaj teknika gazetaro, des pli baldaŭ ni atingos nian celon..... Ne hezitu verki viajn artikolojn en la Lingvo Internacia. La ebloj publikigi en Esperanto jam estas konsiderindaj.”

La rezultojn de la enketo CED publikigos ankaŭ en unu el siaj dokumentoj en la angla lingvo.

CED utiligas tiun ĉi okazon por atentigi ĉiujn esperantistojn pri la ekzisto kaj regula aperado de *Scienca Revuo*, oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista. La jara abono estas 5 ned.guld. aŭ 1,50 USA dol. aŭ egalvaloro. La revuon oni povas aboni ĉe J. Muusses, Purmerend, Nederlando, ĉe la landaj perantoj de ISAE kaj ĉe UEA.

ESPERANTAJ FAKTERMINOLOGIOJ

La kunlaboranto de CED Dipl. Ing. R. Haferkorn estas

nomita gvidanto de la Terminologia Sekcio (TS) de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). La celo de la TS, kiu jam komencis sian laboron, estas registri ĉiujn fakterminarojn jam aperintajn en Esperanto kaj harmoniigi ĉiujn laborojn rilate verkadon de novaj fakterminaroj. La TS instigos la terminaristojn bazi siajn fakvortarojn sur la jam ekzistantaj plurlingvaj fakvortaroj, kiuj estas nomitaj en la tiurilataj verkoj de UNESKO. La TS estas en regula kontakto kun CED, al kiu ĝi liveros de tempo al tempo dokumentitajn raportojn pri la rezultoj de sia agado.

ENKETO PRI INSTRUISTOJ KAJ LERNEJOJ

La granda enketo de CED pri la esperantistaj instruistoj kaj pri la lernejoj, en kiuj en tiu ĉi studjaro oni instruas Esperanton, estas finita. En la sekvanta numero de nia revuo aperos detala raporto de la kunlaboranto de CED S-ro D. Kennedy, kiu okupiĝis pri la demando. Jam nun ni povas informi, ke al la enketo respondis pli ol 300 geinstruistoj kaj ke en preskaŭ 150 lernejoj Esperanto nun estas instruata, nombro konsiderinde pli granda ol en la antaŭaj jaroj.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ	p
Esperanto-Klubo, Vevey, Svislando	—	16	2
Anonima donacinto, Britujo	3	6	8
S-ino E. B. Knight, Britujo	10	—	—
S-ro B. B. Beaumont, Britujo	10	—	—
S-ro B. Reich, Usono	1	15	9
S-ro Cugny, Francujo	10	—	—
S-ro A. Llinas, Hispanujo	7	3	—
S-ro A. F. Doneis, Usono	1	15	9
Centra Dana Esperantista Ligo, Danlando	3	—	—

Stato je al 8-a de marto..... 12 11 7

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam C, Nederlando, al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo, al ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ al CED rekte je la nomo de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, England.

41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago - Danlando

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5 Marto 1956

Adreso: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

Postĝirkonto: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

Nova Fakkunveno: Anoncis sin Akademio de Esperanto, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

Tuttagaj Ekskursoj: Estas aranĝitaj: per ŝipoj en Øresund kun vizito en Helsingborg, Svedujo; per aŭtobusoj al Nordselando kun vizito en Helsingør, kaj al Sudselando kun vizito en Møn.

Postkongresaj Ekskursoj: Okazos 5-taga ŝip-kaj aŭtobusveturado tra Danlando, kaj 6-taga aŭtobusveturado tra Svedujo.

Kotizo: Ek de la 1-a de aprilo la kotizo estos danaj kronoj 48,—, edzino 24,—, gejunuloj 16,—, studentoj 24,—. Individuaj membroj de UEA rajtas raba-

ton 7,—, edzino de kongresano 3,50

Teatraĵo: Teatra Grupo en Kopenhago prezentos dum la Kongreso tri unuaktajn teatraĵojn en Esperanto de Soya, Leck Fischer, Sven Clausen. La tri verkoj donos kompletan bildon de la moderna, dana dramatiko.

Universala Ekspozicio de Esperanto: Ĝi okazos en Kopenhago dum la kongresa semajno por doni la eblecon al la esperantistoj kaj al la publiko koni ĝian valoran enhavon.

Gazetara servo: Ĝi jam ekfunkciis per tri branĉoj kaj laŭ modernaj konceptoj por informadi la eksterlandan, enlandan kaj esperantistan gazetaron.



4. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956


Dua Bulteno: Ĝi estas sendita al ĉiuj aliĝintoj, aldone troviĝas Loĝiga Plano kaj Ekskurso Programo.

Honora Komitato: La Ĉefministro de Danlando, H. C. Hansen, akceptis esti Protektanto de la 41-a Universala Kongreso. La Ministro por Instruado, Julius Bomholt, estas Prezidanto de la Honora Komitato.

Statistiko: (ĝis fino de februaro): Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 9, Belgujo 6, Brazilo 2, Britujo 114, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 214, Finnlando 60, Francujo 115, Germanujo 87, Hispanujo 10, Islando 21, Izraelo 1, Italujo 99, Jugoslavio 59, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 7, Meksikio 1, Nederlando 54, Norda Rodezio 1, Norvegujo 55, Novzelando 1, Portugalujo 2, Svedujo 196, Svisujo 21, Turkujo 2, Usono 9, Venezuelo 1.

Sumo: 1161 el 33 landoj (pasintjare 937 el 27 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario



Pri Dana

Mitalogia

Kiam vi venos en Kopenhagon por partopreni la 41-an UK, vi eble tuj renkontos samideanon, kiu nomas sin Thor; poste vi eble ekscios, ke li loĝas en Thorsgade dum la kongreso, kaj ke en sia hejma urbo Thorslunde li laboras en la fabriko Thorvang sub la ĉefo Thorsen. Mi ne garantias, ke precize tiel okazos al vi, sed neebla ĝi ne estas, ĉar en Danujo pli ol 8000 homoj havas en sia nomo la elementon Thor (nia plej populara antikva dio), kaj ni havas ĉ. 60 urb(et)ojn kaj — sole en Kopenhago — 35 stratojn kun nomo derivita el Thor aŭ el alia diomomo.

La egiptan, grekan kaj roman dio-mondojn la tuta civilizita parto de la homaro pli-malpli konas, sed kiuj konas la mitologion de la nordokcidenta Eŭropo? Certe ne multaj. Tamen laŭ riĉo de fantaziaj kaj aventuraj elementoj ĝi povas sukcese konkuri kun kiu ajn mitologio.

Ni kvazaŭ fieras pro niaj danaj pradioj, verŝajne kiel sekvo el tio, ke dum jarcentoj poetoj kaj aliaj verkistoj senrezerve laŭdis kaj gloris la bataleman spiriton, kiu en tiu fora tempo animis diojn kaj homojn. Tre multaj ili estis, la dioj kaj aliaj supernaturaj estaĵoj, tion ni povas legi en ankoraŭ konservitaj manuskriptoj de antaŭ pli ol mil jaroj, do de la tempo mem, kiam tiu dio-kulto ankoraŭ estis ĝenerala. Tiuj manuskriptoj estas

la fonto por centoj da libroj nuntempe legataj en ĉiu biblioteko kaj en ĉiu lernejo en urbo kaj kamparo.

En la dana tero ni trovis kaj daŭre trovas memoraĵojn de la pratempo, objektojn kiuj ilustras kaj pravas la skribitajn sciigojn. Multmiloj da tiaj memoraĵoj estas konservataj en niaj muzeoj, precipe en la Nacia Muzeo en Kopenhago. En niaj artomuzeoj kaj aliloke pentraĵoj kaj skulptaĵoj memorigas pri dioj kaj diinoj, ekz. ĉe „Langelinie” en Kopenhago la ĉarma Marvirineto kaj la grandioza GEFION-fontano.

Necesus dika libro por rerakonti ĉiujn mitojn pri dioj, duondioj ktp. Ĉi tie estos prezentataj nur kelkaj ĉefaĵoj.

Niaj prauloj imagis la universon proksimume tia: La tero kuŝas kiel insulo en la senfina maro. En la maro vivas la terura serpent-simila „Midgaardsormen”; tiom kolosa ĝi estas, ke ĝi povas ĉirkaŭi, kiel ringo, la tutan teron.

Laŭ la ekstera rando de la tero, inter la granda maro kaj altaj sovaĝaj montoj, loĝas la malbonaj „jætter”; multaj el ili estas centoble pli grandaj ol homoj, kaj ili aspektas kiel ogroj.

Inter la menciitaj montoj kaj la centra parto de la tero loĝas la homoj; krome troviĝas tie ankaŭ miriadoj da aliaj estaĵoj loĝantaj

en aero kaj akvo, en marĉoj kaj montetoj, en kavernoj kaj en ĉiu neordinara terformaĵo.

Sur la centra parto de la tero, eble tre alte, situas la orbrila „Valhal”, kie loĝas la veraj dioj. Tien venas post la morto homoj (eble nur viroj), se ili mortis en batalo, kaj tie ili daŭrigas la batalon plezure mortigante unu la aliajn; sed ĉiun vesperon ili vivaj kaj freŝaj ĝuas orgian festenon kaj amemajn belulinojn.

Sed profunde sub la tero, en la malluma „Helhjem”, kolektiĝas la malestimuloj, kiuj mortis pro malsano aŭ maljuneco.

La personaro de la dia „familio” grandatrajte similas tiun, kiun ni konas de la roma aŭ greka mitologio; verŝajne ilia origino estas la sama.

La ĉefa dio, la „domomastro” en „Valhal”, estas ODIN (urbo Odense); sur sia ĉevalo li povas rajdi en la aero super montoj kaj maroj; du agloj komunikas al li ĉion, kio okazas.

THOR estas „la Herkulo” de la dioj; li estas nepriskribeble forta, eĉ pli forta ol la „jætter”, kontraŭ kiuj li preskaŭ senĉese batalas, tiel ke fulmoj kaj tondroj skuas la tutan mondon; tiu batalado estas necesa, por ke la „jætter” ne venku kaj ekstermu diojn kaj homojn. Lia martelo trafas ĉion, al kio li ĝin ĵetas, kaj ĝi tuj revenas al lia mano.

Kvazaŭ diableto inter la dioj estas LOKE: li fakte estas filo de iu „jätte”, sed ODIN iam adoptis lin, kaj nun li ofte kaŭzas al la veraj dioj grandajn malagrablaĵojn, tiel ke ili devas hejmenvoki THOR, por ke tiu instruu al li konvenan konduton.

La norda diino de amo estas FREJA; ŝi portas la plej brilan kolornamaĵon, kiu iam ekzistis; ĝin faris kvar nanoj, kaj ĝia prezo kredeble ne ŝajnis granda al diino de amo: kvar noktoj kun la nanoj.

La aliaj diinoj cetere ne estas malpli amoremaj ol FREJA; iam ĉe festeno en „Valhal” LOKE incitis la aliajn per senhonta rekta mencio de iliaj „sekretaj” amrila-

toj; eĉ GEFION (elpar. Ge-fjon), la diino de virgulinoj, ne estis escepto.

Jen unu el la multaj aventuroj de THOR:

Dio de la maro, kaj patro de la marvirinoj, estis ÆGIR. Iam la aliaj dioj opiniis, ke nun estas lia vico gastigi ilin ĉe festeno. Li klopodis eviti tiun grandegan elspezon kaj pretekstis, ke li ne posedas kuirpoton sufiĉe grandan por tiom da festenantoj. Unu el la dioj sciis konsilon: „La giganta „jætte” HYMER havas poton, kiu estas unu mejlon larĝa kaj unu mejlon profunda; eble ni povas prunti ĝin.”

THOR estis sendata kun la tasko iamaniere alporti la poton.



Post tuttaga vojaĝo li venis vespere en la monton, kie loĝis HYMER, kiu tiumomente ne estis hejme. THOR kaŝis sin malantaŭ roka kolono por ne tro subite stari fronte al la „jætte” ĉe lia eniro. Baldaŭ li envenis, kolosa kaj potenca; plafono kaj muroj tremis ĉe liaj movoj. Li tuj flaris la dion kaj direktis al la kaŝa kolono rigardon tiom akran, ke la kolono frakasigis.

Nu, ankaŭ inter „jætter” bona regalo al gasto estas neignorebla devo; ili vespermanĝis, kaj THOR siaparte manĝis du virbovojn. HYMER grumblis kaj diris ke morgaŭ THOR mem akiru sian manĝaĵon — en la maro.

La postan matenon ili iris por

fiŝi. HYMER vidis kun kaŝita kolerero, ke THOR kunportas kiel fiŝlogaĵon la kapon de virbovo ĵus elŝiritan. Kiam ili komencis remi, la „jætte” rimarkis — ne sen ioma timo, kiom rapide la boato iras. Baldaŭ ili estis tie, kie HYMER kutime laboris, sed THOR daŭrigis la remadon, dum HYMER protestis aludante al la danĝero pli ekstere pro „Midgaardsormen”.

Fine THOR haltis, kaj ili komencis labori. Post nelonge HYMER tiris du grandajn balenojn en la boaton, sed THOR preparis sin por kaptaĵo kun aliaj dimensioj. Li elĵetis sian logaĵon, la bovokapon; baldaŭ poste li sentis, ke io grandega baraktas malsupre. Li tiris kaj tiradis per la ŝnuro, ĝis fine la terura venensputanta

kapo de „Midgaardsormen” montriĝis super la akvo. Per sia plena dioforto THOR svingis la martelon kaj ĵetis ĝin profunde en la abomenan kapon. La tuta tero tremis kaj montoj tondre fendiĝis ĉe tiu bato; la besto lasis la logaĵon kaj malaperis en la profundon.

HYMER estis terurita, sed li ne lasis THOR rimarki tion. Ili remis al la bordo, kaj HYMER diris sarkasme: „Espereble vi konsentas helpi min, — kion vi portos, la boaton aŭ la balenojn?” THOR prenis tuj la boaton kun balenoj kaj cetera enhavo, metis ĝin sur la ŝultron kaj ekiris.

La „jætte” sentis sin pli kaj pli reduktita; tamen li fidis je sia lasta atuto. Kiam li venis en lian

loĝejon en la monto, li prenis pokalon kaj diris al THOR: „Vi fieriĉas pro ia remokapablo, kvaŭzaŭ ĝi estus io eksterordinara; sed frakasu ĉi tiun pokalon, kaj mi respektos vin.”

THOR prenis kaj ĵetis ĝin kontraŭ dika ŝtonkolono, sed estis la kolono, kiu frakasiĝis. THOR ekoleris kaj ĵetis la pokalon kontraŭ la silikeca frunto de HYMER, kaj tie ĝi splitiĝis en mil pecojn. HYMER perdis la reston de sia superemo kaj kriis: „Foriru! — kaj kunprenu la poton, se vi povas.”

THOR prenis la kolosan poton; pro ĝia pezo liaj piedoj trairis la ŝtonan plankon, sed li sukcesis kaj foriris kun ĝi. Post nelonge li rimarkis, ke sennombra aro da „jætter” persekutas lin, kaj HYMER estis en la unua vico. — „Kia plezuro, fine,” pensis THOR metante la poton sur la teron. Per la martelo li tiel masakris la „jætter”-hordon, ke simila fulmotondro nur malofte okazas dum ekzistas la mondo.

Fine malgranda rakonto pri la antaŭe menciita GEFION, la diino de virgulinoj: — Kiam la insulo Selando ankoraŭ ne ekzistis, ODIN sendis ŝin orienten por havigi pli da tero por Danujo. Ŝi venis al reĝo en Svedujo, kaj post kelktempa amorado kun li ŝi ricevis rekompence tiom da tero, kiom ŝi povis eiplugi en unu tagnokto.

Por havigi al si plugbestojn taŭgajn por tiu laboro ŝi iris al iu „jætte” kaj igis lin gravedigi ŝin; el la poste naskitaj kvar filoj ŝi kreis kvar gigantajn virbovojn, kaj per ili ŝi sukcesis eiplugi tiom da sveda tero, ke el ĝi estiĝis Selando. — En Svedujo restis responda truo: la lago Venern.

Do, leganto, kiam vi venos sur la bordon de Selando por kongresi en Kopenhago, memoru la diinon GEFION; kaj veninte en Kopenhagon nepre iru al la impona GEFION-fontano kaj rigardu, kiel grandioze kaj vive ĝi ilustras ŝian plugadon.

C. Graversen

ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

de Francisko Azorin, Eld: Editorial Stylo, Meksikio, 1955. Unua vol., A-K, XVI plus 644 paĝoj en formato 18 x 24,5 cm.

Peza respondeco ŝarĝas recenzanton de tiu ĉi verko. Kiam iu eldoninto elspezis grandan sumon, kaj kunlaborantoj grandan tempon, por prezenti al la esperantistoj imponan, dikan, grandformatan libron, ĉiu recenzanto deziras renkonti tiun libron kun sincera simpatio. Kiam pli kaj pli profunda legado en tiu libro konvinkas lin pli kaj pli neeviteble, ke la libro estas monstraĵo kaj reprezentas fundamentan danĝeron por la esperantista movado, tiu konstato ne nur kaŭzas al li grandan doloron, sed ĝi devigas al li honestan elpaŝon kun la verdikto, ke la libro estas nepre malrekomendinda. Kaj tia verdikto, kiam temas pri tia libro, kia estas la *Ilustrita Vortaro*, estas peza ŝarĝo sur unuopulojn, kaj starigas ĉe la legantoj demandojn kaj dubojn pri la kompetenteco de la recenzinto kaj eĉ eventuale pri lia persona starpunkto. Feliĉe, mi vidas, ke multaj kolegoj en aliaj revuoj atingis la saman konkludon kiel mi pri la *Ilustrita Vortaro*. Tial mi esperas, ke tre baldaŭ la Akademio de Esperanto publikigos sian oficialan opinion pri tiu verko; kaj ĝis tiam mi plej firme rekomendas al la esperantistoj, ke ili ne aĉetu ĝin.

La *Ilustrita Vortaro* levas tre malagrablajn rememorojn pri la reformisma krizo de 1894 kaj pri la Ido-krizo de 1906-7. Eĉ se ĝiaj kompilintoj dezirus kaŭzi konfuzon kaj skismon en la vicoj de la esperantistoj, ili apenaŭ trovis pli subtilan kaj efikan manieron por tion fari, ol tiu ĉi vortaro. Se parto de la esperantistoj ĝin ekuzus konsekvence, baldaŭ aperus Azorina dialekto de Esperanto, kaj la lingva unueco estus detruita. La malamiko de la internacia lingvo jubilus, kaj la konsiderindaj progresoj de la lastaj jaroj estus perditaj, eble por ĉiam! Jes, ĝuste tiel danĝera, laŭ mia opinio, estas la publikigo de tiu ĉi vortaro!

Vortaristo havas la devon konstati la lingvouzon de la popolo, kaj prezenti ĝin en tia formo, ke ĝi reprezentas facile konsulteblan gvidilon al tio, kio estas. Vortaro ne estas ĝusta loko por disvastigi siajn personajn ĉevaletojn kaj prezenti siajn reformproponojn, *precipe se la vortaro pretendas esti aŭtoritata* por la parolantoj de la koncerna lingvo. Oni povas nur miri pri la aplombo de s-ro Azorin kaj liaj kunlaborintoj, kaj pri la nerespondeco laŭ kiu ili malrespektas la Fundamenton de Esperanto.

Jes, malrespektas la Fundamenton; ĉar paralele kun multaj fundamentaj vortoj oni trovas „pli bonajn” alternativojn, ekz-e apud AJLO: *alio*; apud AMBAŬ: *ambe*; apud DOMENO: *domino*, ktp. Kaj inter la oficialaj vortoj tute mankas multaj, ekz-e, *AŬTOMOBILŬ*, kiu estas fantazie korektita al *aŭtomovilo*

(*aŭto-movilo* — ĉu vi kaptas la nuancon?); same GLICERINO al *glikertino*, kaj multaj aliaj. Kaj ekster la oficiala radikaro ĉiuj limoj estas ignorataj: KLERIKALA fariĝas *klerigala* („al klerigo rilata”), DIPLOMATO signifas *diplomato*, ktp. Kion, laŭ via opinio, signifas *ekvido*? Ne, vi eraras: laŭ Azorin ĝi signifas „ido de ekvo”. Kaj kio estas „ekvo”? Jen: „Genro zoologia de kvarpiedaj mamuloj el kiuj nur vivas nuntempe unusola speco, la ĉevalo, kun variantoj kaj miksaĵoj, inter ili la mulo; ĉiu el ili.” Se vi ankoraŭ havas iluziojn pri la utileco kaj dezirindeco de tiu vorto, ni rigardu sub *ekva*, kiu signifas: „rilata al ĉevalo”.

Supre mi skribis multe da ktp, donis nur po unu aŭ du ekzemploj de nur kelkaj malbonaĵoj. Por plene montri la malbonecon de la *Ilustrita Vortaro* necesus libro preskaŭ same dika, kaj ĉiuokaze pli da spaco ol mi disponas. Tial mi nur aldonas mallongan liston de la ĉefaj trajtoj de la verko, kun la certigo, ke mia listo apenaŭ tuŝas la fundamentan danĝerecon de la verko:

a). Aliigo de fundamentaj kaj oficialaj vortoj;

b). „Senbalastigo” de Esperanto per ekskomuniko de „senutilaj” radikoj. Tiel kometo estas *eta komo*, *koketa* estas *kok-et-a*, *kanono* estas *ono de kano*, ktp;

c). Malĝustaj difinoj, ekz-e: *anabaptismo*: „pledanta la nebaptadon de la infanoj”, ktp;

d). Trompaj etimologiaj klarigoj: *korveto*, kiu, laŭ Azorin, ricevis sian nomon ĉar ĝi estis „ordinare nigre pentrita” (kiel korvo!), sed efektive ricevis ĝin ĉar ĝi havis *korbsimilan* formon. (Do kial Azorin ne ŝanĝu la radikon al *korbeto*, aŭ eĉ — konsekvence — *korbego*?) ktp;

e). Gramatikaj eraroj de la kompilintoj mem: „ADAM-o, homo kreita de la Eternulo el argilo, *enblovante en ĝi spiron de vivo*”, ktp. Tiaj gramatikaj eraroj tiel svarmas, ke ili per si mem

sufiĉus por igi nefidinda la verkon!

f). ilustraĵoj ĝenerale senutilaj, kaj ofte eĉ erarigaj.

Finvorte, mi povas nur reiri al tio, kion mi diris komence. Konstatante la grandan laboron kaj multan monon postulitajn de la pretigo kaj publikigo de la verko, mi tamen ĝin forte malaprobas.

Oni atendu la verdikton de nia Akademio.

W. Auld.

ATENTIGO. Trarigardinte la ĵus aperintan ILUSTRITAN VORTARON, la estraro de UEA fiksas kiel sian oficialan starpunkton, ke UEA ne plu reklamos la libron nek vendos ĝin ĝis la Akademio estos dirinta pri ĝi sian opinion.

***Matematika Terminaro** de C. M. Bean, B.Sc., Ph.D., F.R.I.C. Eldonis UEA, 1954. Prezo 1ŝ. 6p.

Oni diras, ke la muziko kaj la matematiko jam estas universalaj lingvoj, kaj tio estas vera pri muziko, kaj parte vera pri la matematiko — se oni legas. Sed por paroli pri ambaŭ temoj oni nepre bezonas terminaron. La recenzata verketo estas sufiĉe ampleksa por la nuna tempo. Se venos tago, kiam multaj matematikistoj uzas Esperanton, tiam sendube la vortaro kreskos sur la bazo nun prezentata. D-ro Bean prenis multajn terminojn el ekzistantaj fontoj, kaj klare indikas de kie ili venis. Kelkfoje li proponas formon similan al vorto alie uzata, kaj nur la tempo kaj la uzado povos decidi pri la pli bona el la du formoj. La demando ĉiam sin proponas: ĉu oni devas uzi ordinaran radikon por speciala scienca ideo, malpli ĝenerala, aŭ ne? Ekzemplo estas la proponita *forso* anstataŭ la ĉiutaga vorto *for*to, ĝis nun multe uzita en scienca rilato. Denove, la tempo kaj la uzado devas decidi. Ni estu dankemaj al D-ro Bean, kiu provizas tiel bonan fundamenton, sur kiu oni povas konstrui.

E. F. Relf

Franco

Okaze de la Nacia Kongreso de la Franca Esperantista Unio (Marseille, 20.5.56) speciala poŝtoŭicejo kun esperantista stampo funkcios, la dimanĉon 20an, en la kongresejo. Speciala stampo kun la vortoj: CONGRES D'ESPERANTO - MARSEILLE 20 Mai 1956 estos surmetata sur ĉiuj leteroj kaj kartoj enpoŝtigataj ĉe tiu oficejo.

Memoraĵoj: Kvin poŝtkartoj esperantistaj kaj folkloraj kaj koverto. Ĉiu karto kun P.M. 12-franka: 2 steloj; kun P.M. 18-franka: 2 st. 40 — La koverto kun P.M. 15 franka: 1 st. 40; kun P.M. 30-franka: 2 st. (Nur tiuj memoraĵoj ricevos duan grandformatan stampon, kun esperanta teksto).

La Organiza Komitato (S-ro Ribot, 11 rue Vergnes, MARMANDE, Francujo) poŝtĉekkonto 30-900 Bordeaux, akceptos ĝis la 17a de Majo inkluzive (lastan daton!) la mendojn por memoraĵoj

Por alsendo de la memoraĵoj en granda koverto, bv. aldoni 1 st. 30 plie. La steloj kaj internaciaj respondkuponoj estos akceptataj.

★

Okaze de la proksima „Fairo de Parizo” la Franca Propaganda Fakto intencas fari tute novan prezentadon pri turismo.

Tiucele bonvolu sendi materialon (afiŝojn, broŝurojn, ktp) al UEF-sidejo, 34, rue de Chabrol, PARIS 10e.

Korekto

S-ro Isbrucker atentigis nin pri la fakto, ke li ne persone pagis la kostojn de la Gazetarkonferenco en Hago (vd. februara ESPERANTO). Li povis pagi la duonon el sumo de kelkaj centoj de guldenoj, destinitaj al la propagando de Esperanto, pri kiu li disponis, kaj la reston pagis la Internacia Instituto de Esperanto.

Vagada sub palmai (9)

Taourirt

Strangaj Ĉasoj

Tio ja estas konata: Ĉasbestoj ne abundas en Saharo. Nemrodo mem, potenca ĉasisto antaŭ la Eternulo, ellernus kontrakto-briĝon kaj sin nutrus per laktukoj, jagurtoj aŭ akridoj laŭsezzone. Ĉar kion kapti sur tia senvivejo, krom skorpio en sian ŝuon, erarantan kaprinon pro akcidento aŭ plejofte sunfrapon, kiu bele skarlatigas vian nazon, tion mi demandas al vi?

Mi estas kutime pacema, kaj ne ŝatas partopreni kruelan buĉadon al senpekaj animaloj, kiuj neniam malbonigis min. Mi apenaŭ konsentas frandeti femuraĵon el gazelo aŭ flugilon el otido, nur kondiĉe, ke ĝi estas arte rostita kun iometo da ajlo kaj stangeto de fenkolo. Tamen mi konfesas, ke foje-foje mi furioze batalas kontraŭ tiuj vilaj muŝoj, kiuj multiĝas ĉie, kie mi haltas por lunĉi. Kaj kiam mi vidas la glutemajn dipterojn ekmordi apetitan viandpecon antaŭ ol mi, pardonu, sed mi kvazaŭ senkonsciiĝas kaj ilin uragane masakras per speciala frapilo, fleksebla kaj senpardona. Estas ĝismorta lukto: ĉu la muŝoj, ĉu la viandpeco. Spite al vi, barbaroj, tia mi estas.

En ĉi tiu bona malnova tempo mi restadis en Reggan, kaj forpasigis longajn horojn argumentante kun la regiona kaido, nobla maljunulo, kiu podetale komercas per nigraj sklavinoj eltiritaj el Sudano. Mi vane rezonadis, provante lin persvadi, ke preferinde estus negoci pri kameloj, petrolo aŭ folkloraj memoraĵoj. Li ĝentile aŭskultis min, balancante sian ebonkapon, kiel azeno antaŭ televidaparato, kaj trinkante nenombreblajn tasojn da verda teo. Estis kvazaŭ se mi volapŭke predikus.

Iun tagon, por sin liberigi de mia naŭza elokvento, li proponis al mi ĉasekskurson en Taourirt, palmareto ĉe la limo de la timinda Tanezrouft, lando de soifo kaj miraĝo. Mi inteligente konkludis, ke li atendas karavanon kaj deziras nehelpate ricevi trezoron el Sudano. La morgaŭon, je turkisa tagiĝo, freŝa kiel rideto de premiita virgulino, antaŭ mia dometo atendis du „mehara” (*) kaj gvidanto portanta du eksmodajn karabenojn. Li afable sin nomis: Abdallah, kaj instigis min surseliĝi. Baldaŭ ni suden ambliis sur sableca vojaĉo, kiu kaŝludas inter la dunoj.

Jam la suno petole bombardadis la vojaĝantojn milde lulatajn je interetaĝa alteco. Post momento, subite inspirite de Apolono, Abdallah tiris flaĝole-

ton el sia turbano kaj improvizis procirkonstancan sonaton, kiu tuj efikis sur la toleremajn dromedarojn. Ili skandale moderigis sian elastan irmanieron, kaj nia higiena promonado verfakte iĝis dimanĉa gapvagado.

La varmo, la muziko kaj la teda rulado de mia ŝipo min dronigis en ekztaza brutigo. Mi preskaŭ defalis de mia malfirma balkono, kiam vigligis min raŭka ekkrio de la virtuozo:

— Taourirt...

Kaŭriĝis la dromedaroj, dum mi sorbis abomenan selakton ceremonie prezentatan de la tribestro. Tiam Abdallah konfidis al mi:

— Ĉu vi jam ĉasis tobalkokon?

— ?... ?.....


— Vi neniam vidis tobalkokon? Nu, ne ŝargu vian pafilon kaj rapidu. Li kuntrenis min al apuda monteto, kie kreskas spongecaj likenoj, anemiaj tamarikoj kaj rondaj ŝtonoj sur kiujn mi stumblis ĉiun trian paŝon.

— La tobalkoko, li klarigis, estas birdo preskaŭ dika kiel matura numido, sed kiu ne flugas. Ĝia dekstra kruro estas pli mallonga ol ĝia maldekstra. Ĝi do translokiĝas nur sur deklivaĵo, kaj kompreneble ĉiam laŭ la sama direkto, rondirante ĉirkaŭe kaj dekstre de la supro. Sekve, ĝi ne povas reveniri sur sia vojo sen ŝanceliĝi kaj bekaltere fali. Aliparte ĝi estas tiom sciavida kiom pariza pordistino, kaj tio estas mortomerita peko. Rigardu ... jen unu...

Mi haltis kaj ekvidis ian laman birdon, kiu kviete pikpikadis maloftajn grajnojn, aperigante arogantan postaĵon. Abdallah eligis akutan voĉsonon:

— Jupiiii... jupiiii...

Ĉe tiu melodia voko la sciema galinaco abrupte sin turnis al ni. Kiel atendite la akcidento okazis: mankis la grundo sub la dekstra piedo de la sengar-



(*) **Mehara:** pluralo de mehari: rajdodromedaro.

dulo, kiu piruetis, renversiĝis kaj ne povis restariĝi. Tial Abdallah ĝin kunprenis kaj puŝis en la kapuĉon de sia burnuso.

Ni pluen daŭrigis nian iradon sur la klinaĵo, kaj dua tobalkoko perdis la liberon laŭ tiu makiavela procedo. Mi mutiĝis de surprizo kaj ne kredis al miaj okuloj.

— Sufiĉe, venke ruktis la abrahamido, fortordante la kapon de la kaptitoj. Jam la suno iom tro varmas. Ni iru en la palmaron, kie ni certe trovos aliajn bongustaĵojn. Ni unue ĉasos du-tri figatelojn.

— ...figatelojn? ...Mi neniam aŭdis pri...

— La figatelo estas griza birdeto, kiu kutime nestiĝas nur en figarbo. Malfacile estas ĝin kapti, ĉar vidinte ĉasiston, ĝi tuj perpiede pendiĝas de branĉeto, kaŝas sian kapon sub flugilon kaj tiele similas al ordinara figo. Pro tio oni nomas ĝin figatelo.

Ni alproksimiĝis al fruktoriĉa figarbo; najbare flugetis graciaj birdetoj, kiuj subite malaperis en la densan foliaron. Kiom ajn mi malfermegis la okulojn, mi vidis nur figojn kaj neniun figatelon. Mia subtila mentoro longigis kompetentan manon al figo kaj plukis birdeton. Li plurfoje elektis inter belaspektaj fruktoj kaj senerare rikoltis ses aŭ sep figatelojn, kiuj pereis en la kapuĉo. Mi provpalpis mian kranion; ĝi ankoraŭ ripozis sur miaj ŝultroj, sed estis malplena, kun tintilo interne.

Iom malproksime mi rimarkis brilkoloran birdon sur dorna kaktuo, aŭ kakteo aŭ kaktaco, mi ne plu scias.

— Ha!... jen rotokolo, instruis min Abdallah. Lasu min ĝin eduki. Li tirane ekzamenis la birdon, kvazaŭ li volus ĝin hipnotigi. Konsternite pro tiu neatendita konduto, la senspritulo lin streĉe konsideris kun demanda mieno. Tiam Abdallah dekstren ŝtelpaŝis, paŭzetis, krabe rondiris ĉirkaŭ la dorneca arbedo, ĉiam direktante doganistan rigardon al la suferanto, kiu lin atente okulsekvis. Li faris plenan rondiron. Li faris du. Alnajlite al sia sidilo per tia insida minaco, la birdo, kies kapo rotaciadis laŭ la movoj de la dresisto, strabe palpebrumis, senspiriĝis, ellasante violaĉan langon. La sagaculo faris trian rondiron. Tiun ĉi momenton, kun la kolo trifoje tordita, la turmentato sin mem definitive sufokis kaj falis ĉe la piedon de la kakto, de kie mi ĝin levis.

— Nu, al vi, li ordonis, montrante naivan rotokolon komforte sidantan sur gracila gumarbo. Je mia vico, per drasta rigardo kaj loga dancrondo mi ĉarmegis la nekuraceblan stultulon, kies okuloj tuj algluiĝis al mi. La afero nelonge daŭris. Ĉe la tria promeneto mi sukcesis elegante nodi la kolon de mia viktimo, kiu spirale alteriĝis.

— Brave, gratulis min la majstro. Nun estas horo por tagmanĝi, ĉu ne?

— O.K. mi arabe konsentis.



Ŝajnis, ke tiu satana suno cinike rikanas kaj perturbas mian komprenpovon. Apud mia neutila karabeno mi konfuze rapidigis grujeran sandviĉon kun skatolo da asparagoj el Kalifornio; la magiisto kontentiĝis gargari per plenkarafo da fermentinta palmovino, kiu abrupte lin ĵetsternis sur la blondan sablon. Oni lin ŝarĝis kiel sakon da daktiloj sur grumbleman diomedaron, kaj li forronkis sian ebriecon dum la tanga returniro. La nefrivolaj rajdobestoj senprokraste troitis al Reggan. Sendube urĝis al ili revidi sian amatan familion, ĉar la vojaĝo tiel rapide fluis, ke mi ne primemoras ĝin.

Ĉe la alveno, elsavite el nedubebla skizofreno, mi reakiris klaran menson, deglitis de mia mehari, dum Abdallah tuj forŝoviĝis senadiaŭe. La kaido mondume informiĝis:

— Bonan ĉason?

— Bonan aferon? mi rebatis.

Ni preferis babili pri la vetero kaj la trasahara relvojo.

Elsuĉinte tri ritajn tasojn da teo, li kompleze invitis min vespere promeni en la palmaro.

— Ni ĉasos kelkajn palmhelikojn, li konfidence aldonis.

Krrrrr..... Mi preskaŭ eksplodis. Miaj piedfingroj konvulse grimacis, kaj ekfluo da sango invadis miajn orelojn. Tamen mi silentis kaj cedis, projektante prepari miajn pakaĵojn tuj kiam aŭroros la karneroza morgaŭo kaj senrevene forlasi tiun inferan landon.

Laca pro sendanka laborado, la suno decidis enlitiĝi kaj malaperis. Nun milda sereneco regas sur la paca palmareto, kiu fandiĝas en mire viola lumo. La novluno profitas la oportunan okazon por sin vidigi sur la gemsemita ĉielo. Ĝi arĝente farbas la sveltajn palmojn, kiuj dandas sub la malvarma kareso, kaj disĵetas milojn da perloj en la stelamajn marĉetojn. Mi ja pliamus revadi kun frandakokinjo en tiu idilia pejzaĝo ol vojiri por ĉasi gastropodojn.

Noktiĝis kiam mi atingis la rendevuejon. Tie mi trovis mian piraton kun pluraj ĉaspelistoj. Unu portis tamburon, dua elektran lanternon, aliaj akvumilojn kaj la lasta felsakon. Mi ne petis klariĝojn timante senbridigi misterajn potencojn, kiuj kapablas heliken min transsorĉi.

— Antaŭen, komandis la kaido.

Tiam la tamburisto ekiris, baldaŭ sorbata de la mallumo, kaj plaĉe ludante per lertaj bastonoj. Li majstre imitis la tondron, kiu ekkrakas supre de la kapo, longe ruladas tra la valoj, malkreskas kaj obtuze agonias al la horizonto. Lin sekvis la lampisto naskante veremajn fulmetojn de sia aparato, kiu intermite iluminis la subarbejon. Malantaŭe unuope procesiis kvar pluvportistoj, verŝante ĉiu laŭvice bonefikan akvon, kiu kristalece plaŭdadis sur la seka grundo. Jen neordinara sceno, mi pensis, nur mankas venteto por perfektigi la fenomenon. Sed mi ne kuraĝis tion postuli de la kaido.

Kompreneble ĉe tiu falsa kaj miniatura fulmontondro, nombraj helikoj gaje ekrampis el la sulkoj de la palmotrunkoj, en kiuj ili splene vesperis. Ili tobogane glitis ĝis la tero, malfaldis sian dukornan radaron kaj entreprenis sanigan promeneton. Kiom ĉarmaj vidiĝis la bestetoj, ĝuante iom da freŝa aero kaj flustrante flirtaĵojn ĉe ĉiu stipa vojturno. Tia spektaklo ĝislarne kortuŝis min, sed la lasta flibustro ilin sovaĝe kaperis kaj enŝovis en la sakon, kiun li traŝultre portis.

— Kun vinsauĉaĵo? mi ironiis.

— Laŭ burgonda modo, respondis la manĝemulo.

Mi sentis kvazaŭ bezonon vegetari kaj trasezoni en Laponujo, kie pala suno ne ĵonglas per la kranioj de honorindaj oficiroj. Hejmen reirinte, mi zorge esploris sub la lito kaj en la litkapa tableto por kontroli ĉu tie ne sin kaŝus malica diableto, kiu mistifikus min la tutan nokton. Sufiĉe da koboldaĵoj hodiaŭ! Mi eltrinkis plenpokalon da brando kun sodakvo kaj beate kuŝiĝis sur mia malmola matraco.

Reviviĝis en mia febra cerbo la epizodoj de tiu ekstravaganca tago. Estas decidite, mi foriros de tiu kabala oazo, kie ruiniĝas mia prudento. Mi estas denaske destinita por dece vivi en provinca urbo, kie mi trankvile kadukiĝos ĝis satrapa eme-riteco.

Tamen, kie mi trovos tiom da strangaj kuriozaĵoj, kiuj paprikas la sengustaĉajn horojn de okcidenta ekzisto? Kie mi renkontos kaidon, kiu brokantas nigrajn koketulinetojn kaj pliŝatas raguon el helikoj ol bifstekon kun frititaj terpomoj, aŭ kameleston, kiu senpene plenigas sian kapuĉon per figateloj?

La kubo estas ĵetitaj, mi restos. Mi aĉetos sudanan belulineton de Lia Kaida Moŝto, kaj elbeninte longegan klaĉadon pri la trasahara relvojo, antaŭ flakoneto da palmovino, mi eltiros el la ruza Abdallah kelkajn el liaj sekretoj, kiuj ravas la birdojn. Mi konas bonan amikon en Skotlando, kiu nepre miregos, kiam ni kune postkuros tetroyjn ĉirkaŭ la lago Katrine.

Kaj kun rideto sur miaj pekpuraj lipoj, mi rekte forfalis en idiotan sonĝon.

Antaŭ returniro . . .

Jen la vagado ĵus ĉesis. Vi vin pretigas por reiri al viaj penatoj pli-malpli kontenta pri la spektaklo. Vi sendube kunportos en via memoro du-tri pitoreskajn vidaĵojn tute baniĝantajn en la senkompara lumo de tiu kruela dezerto.

Koncerne la gvidinton; li sen plua atendo bezonas dungi flegistinojn, blondan kaj bluokulan, pro persista kapdoloro. Kun ŝi li intencas liber-tempi en sia milda Turajno „la ĝardeno de Francujo”, kie li revigliĝos, ŝirante la rozojn de ĝuiga ripozo.

Sed li aŭdis, ke maliceta koboldo lin sekrete enkatenigis al tiu ensorĉanta vakuo, ekde nun preparas sian verdan kandelon, kaj dronigos lian animon en stranga nostalgio. Jam atingas lin sirena kanto:

Kiam revenos la daktilsezono

Ci returniros al Sunama zono . . .

Kial ne? Nur Allah scias.

Gravaj okazaĵoj en Strasbourg

De la 15-a ĝis la 21-a de Aprilo okazos en Strasbourg la 8-a Sesio de l'Eŭropa Konsulta Asembleo en kies tagordo estas la *priekzameno de la demando pri eksperimento de oficiala enkonduko de Esperanto* en kelkajn lernejojn el kvin landoj. Je tiu okazo, por tiun Asembleon perfekte dokumenti kaj favore decidigi, granda Esperanto-Ekspozicio (kiu, en Montevideo, tiom bone influis UNESKOn) estos starigita ĉe la Sidejo de l'Eŭropa Konsilantaro.

Samtempe, akorde kun la Inform kaj Propaganddirektoro de la Eŭropa Konsilantaro kaj kun la Urbestro de Strasbourg, la Unionista Movado, kiu estas nek asocio, nek partio, sed nur mobiliz-organismo por unuigi ĉiujn fortojn (esperantistojn aŭ ne) kaj bonvolajn homojn por akceli la porpacan kaj prosperigan kunlaboron inter la popoloj, organizos

gravajn manifestaciojn inter kiuj la plej grava estos la „*Popolfratiga Renkontiĝo*” al kiu la esperantistoj kaj neesperantistaj simpatianoj el ĉiuj landoj estas varme invitataj!

Lasthore ni sciigas pri alia sukceso: La Urbestro de Strasbourg (Urbo ĝis nun malfavora al Esperanto) S-ro Altorfer, tre afable, konsentis oficiale, unue inauguri la Ekspozicion, due organizi akcepton de la gesamideanaro en la Urbdoma Salonego!

Depost 1948 ni batalas, ni senlace laboras por ke alvenu la tago de oficialigo de Esperanto. Nun, ni do opinias ke la Esperantistoj, ĉefe tiuj de la plej proksimaj francaj Federacioj Orientfranca, Franche-Comté, Bourgogne-Jura kaj Nord-Orienta devas veni multnombre al la granda Renkontiĝo de Strasbourg.

Ni varme alvokas niajn amikojn el plej proksimaj landoj, t.e. el Benelux, Svisujo, Germanujo, Italujo kaj Aŭstrujo,

ke ili multnombre venu al Strasbourg. Jen la definitiva programo:

Sabato 14-an de Aprilo: 15 h. Inauguracio de la Ekspozicio de S-ro ALTORFER, Urbestro de Strasbourg.

17 h. Oficiala Akcepto de la Urbestro en la Urbdoma Salonego.

20 h. Amika Vespero.

Dimanĉo 15-an de Aprilo:

Matene, Vizito al la Ekspozicio.

Tagmeze, Komuna Manĝo.

Posttagmeze, je la 15-a h.: Popolfratiga Renkontiĝo sub prezidanteco de S-ro LEVY, Direktoro de la Informado kaj Propagando de la Eŭropa Konsilantaro.

Por reteni ĉambrojn, vin turnu al: F-ino Erica DIETZ, rue Sengenwald, Strasbourg (Bas-Rhin).

Por la Organiza Komitato:

*Pierre PETIT
Prof. LAURAT
Hubert FEREZ*

Esperanto-Diffusion Française (= Franca Esperanto-Disvastigo)

estas la nomo de nova, por-Esperanta agadcentro, kies sidejo troviĝas en la franca ĉefurbo (Adreso: 2, Avenue Debidour, PARIS 19e). La subnomo de tiu neprofitcele funkcia entrepreno estas: *Centre d'information et d'enseignement*, tio signifas: centro por informado kaj instruado.

La celojn de ESPERANTO-DIFFUSION FRANÇAISE oni divenas tra ĝia subnomo; jen pli larĝasenca difino de tiuj celoj:

- 1) *Informi*, per modernaj metodoj, la instruitan tavolon de la franca publiko pri la ekzisto, la tutmonda uzado kaj la multenombraj uzeblecoj de la internacia lingvo. Samtempe montri la valoron de Esperanto, grava kulturfaktoro, kaj ĝian influon sur la evoluon de la homa socio;
- 2) *Instrui*, per modernaj metodoj, la internacian lingvon al franclingvuloj en Francujo kaj en aliaj pli-malpli franclingvaj landoj (Belgujo, Kanado, romana Svislando, k.a.), precipe al meze kaj altgrade instruotoj, kiuj ial malpovas aŭ maldeziras partopreni Esperantokursojn.

Por informi pri Esperanto estos uzata serio da aktualaj varbiloj (presaĵoj, cirkuleroj, CED-raportoj franclingven tradukataj, k.a.), grandnombre disdonotaj al studentoj kaj diversfakaj profesiuloj. Parto de tiuj varbiloj jam estas presata; certa kvanto da ili povos esti senpage disponigata, por celkonforma uzado, al gesamideanoj kiuj konsentas partopreni la informkampanjon, lanĉatan de ESPERANTO-DIFFUSION FRANÇAISE.

Por instrui Esperanton estos uzata la tiel nomata „*Méthode Autodidactique d'Esperanto*”, kiu konsistigas novspecan metodon por novuloj kiuj emas lerni nian lingvon hejme, meminstruiĝe, sen helpo de instruanto. Tiu lernmetodo speciale verkita intence al autodidaktuloj estas eldonata de „*Librairie des Editions Nova*” en MULHOUSE kies Esperanto-fako publicis antaŭnelonge la sukcesajn NOVA-lernilojn „*Manuel d'Initiation*” (de Bernard Thaillet) kaj „*Manuel d'Etude*” (de Jean Couteaux). La studmaterialo de la menciita „*Méthode Autodidactique d'Esperanto*” estas jam presita; ĝi estas liverata al mendantoj depost januaro 1956. Klariga informilo estos sendata senpage al ĉiuj gesamideanoj kiuj deziras plibonigi sian Esperantoscipovon, kaj ankaŭ al tiuj kiuj bonvolas diskonigi la novan lernmetodon al siaj francaj kaj/aŭ franclingvaj gekonatoj.

Ni substrekas ke la agado de ESPERANTO-DIFFUSION FRANÇAISE (kiu, ideologie, estas sendependa) plene koincidas kun la fundamentaj tendencoj de ĉiuj nuntempaj Esperanto-organizaĵoj (U.E.F., G.E.E., k.a. unuflanke, kaj

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (São Paulo), Brazilo.
	23.00-23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30-13.00	La Coruña. 250m P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402 m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.00-19.15	Stockholm, 42m, 25.63m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo, Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30-15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.
	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.55-18.10	Roma. 41.24 m, 30.90 m, 25.40 m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15-22.20	Hilversum. 298m, 188m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45-06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 370m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	11.15-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15-22.22	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma:

4.IV, Mondo Esperantista; 6.IV, Leterkesto kaj bibliografio; 11.IV, Novajoj el Italujo; 13.IV, Itala turisma restadejo Val d'Aosta; 18.IV, Nia gazeto; 20.IV, Promenado tra Romo; 25.IV, Festivalo de la itala kanzono; 27.IV, Guglielmo Marconi, okaze de la datreveno de la naskiĝo.

U.E.A., U.L., S.A.T., ktp. aliflanke), nome: Varbi novajn simpatiantojn, „fabriki” novajn esperantistojn, kaj membrigi ilin al la por ili konvenaj nacia kaj internacia(j) E-asocioj. Sekve la klopodoj de ESPERANTO-DIFFUSION FRANÇAISE estas nepre subtenendaj de ĉiu samidean(in)o, kia ajn estu lia aŭ ŝia persona mondkoncepto.

Por ricevi poŝtrevene ĉiujn deziratajn varbil specimenojn kaj informojn, bonvolu peti ilin ĉe la eldonejo de la publikaĵoj de ESPERANTO-DIFFUSION FRANÇAISE, skribante senpere al: *Librairie des Editions Nova*, 40, Avenue Gustave-Dollfus, MULHOUSE.

Bernard THAILLET

Radio - Babiloj

(5)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Radio-Servo de N.C.K.E.

En nia 4-a babilo ni skribis pri la radio-situacio en Nederlando. La scio pri la litergrupoj, kiuj iniziale indikas la diversajn radio-asociojn, ŝajnas preskaŭ litera(-)turo, al kiu oni devas dediĉi seriozan studon.

Same studindan litera(-)turon prezentas al ni la diversaj Esperanto-organizoj en Nederlando, kiuj ĉiuj havas sian apartan monatan organ(et)on: la ĝenerala, politike kaj religie neŭtrala asocio „L.E.E.N.” (= „La Estonto Estas Nia”) aperigas sian organon „Nederlanda Esperantisto”; „N.K.” (= „Nederlanda Katoliko”) uzas kiel sian organon la internacian I.K.U.E.-gazeton „Espero Katoliko”; „F.L.E.” (la laborista Esperanto-asocio „Fidu la Estontecon”) eldonas la gazeton „Laborista Esperantisto”; „K.U.N.E.” (= protestanta „Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj”) sendas al siaj geanoj la internacian K.E.L.I.-organon „Dia Regno”. La diversaj organizoj laboras ĉiu sur sia aparta tereno, sed ankaŭ kune sur komuna tereno.

Kiel la radio-asocioj havas sian kunligan instancon „Nederlanda Radio-Unio”, tiel la Esperanto-organizoj laboras kune en la „Nederlanda Centra Komitato Esperantista” (N.C.K.E.), kiu havas diversajn (komunajn!) servojn: Ekzamena Komisiono, Propaganda Servo, Dokumenta Servo kaj Radio-Servo.

En radio-rubriko speciale interesas la belegantojn la lasta.

Tial ni citas kelkajn fragmentojn el la jarraporto 1955 de la Radio-Servo N.C.K.E., kies laboro estu imitata ĉiulande:

„La Radio-Servo de la N.C.K.E. en la 1955-a jaro regule daŭrigis sian laboron konsistantan el la kompilado de la listoj de Esperanto-radio-dissendoj — en la nederlanda lingvo por la radioprogramaroj kaj en Esperanto por la organoj de la Esp.-organizoj aliĝintaj al N.C.K.E. — kaj dissendo de tiuj listoj al la redakcioj de la nomitaj gazetoj. Ĉiudusemajne ni sendis la liston por du semajnoj al la redakcioj de „De Radiogids” (VARA), „Vrije Geluiden” (VPRO), „De Radiobode” (AVRO), „Katholieke Radiogids” (KRO) kaj „Omroepgids” (NCRV). La unuaj tri programaroj aperigis niajn informojn en specialaj okulfrapaj anguletoj de la programoj de la koncerna tago. Ekzemplo imitinda — ankaŭ eksterlande.

...; VPRO dissendis ambaŭ kristnasktagojn matene kristnaskan saluton ne nur en 4 naciaj lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto por la unua, sed certe ne por la lasta fojo laŭ letero ricevita for de la programestro de la VPRO.

De tempo al tempo, kiam estas gravaj ŝanĝoj en la listo, ni kompilis nian radiorubrikon „Verdlando Vokas”, kiun ni sendis al la redakcioj de la gazetoj „Ned. Esp.”, „Lab. Esp.”, „Espero Katolika”, „Dia Regno”, „La Juna Vivo” kaj „Irlanda Blindulgazeto”...

Ni turnis nin al la Nederlanda Radio-Unio (NRU) por peti:

a: okazigi Esp.-radio-kurson en la komuna programo;

b: disaŭdigi la Esp.-kantaton „El la Vivo de Zamenhof” (teksto de prof. d-ro E. Privat; muziko de Frieso Mooleenaar) la 15-an de dec. 1955-a en la komuna programo.

Respondo pri a: NRU ne povas komenci dissendi Esp.-lecionojn, ĉar tiukaze venus petoj dissendi lecionojn ankaŭ pri aliaj lingvoj; la anglalingvaj okazas por nederlandaj geelmigrontoj al regionoj, kie oni parolas angle.

Respondo pri b venis de la estro de la Muzik-Servo de VARA, kiu pripensas dissendon de tiu kantato 14/IV aŭ 15/XII/1956-a. Li petis alsendon de la partituroj, kiujn la komponinto jam havigis al li laŭ niaj peto kaj instigo.

En 1955-a la Radio-Servo dissendis 202 poŝtaĵojn.”

Ĉiuj belegantoj de ĉi tiu rubriko bonvolu skribi al la

„Nederlanda Radio-Unio” (NRU), postbus 150, Hilversum (Ned.), ke ili estas tre scivolaj pri la kantato „El la Vivo de Zamenhof” de Frieso Mooleenaar kaj ŝatus aŭskulti ĝin per Radio Hilversum en unu el la Zamenhofaj memortagoj en 1956-a.

En ĉiu lando oni ekfunkciigu Radio-Servon, kiu informu la belegantojn de la radioprogramaroj pri la Esperanto-radio-dissendoj. Utila servo kaj bonega propagandilo!

Sukceson al ĉiuj geklopodontoj!

J. J. de Jong

↓↓↓

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 29-a de februaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Hispanujo	1825	1555	85.20
2.	Svislando	1740	1450	83.33
3.	Britujo	7608	6138	80.67
4.	Belgujo	2135	1680	78.68
5.	Nederlando	5074	3880	76.66
6.	Finnlando	2872	2115	73.64
7.	Francujo	5869	4073	69.39
8.	Italujo	3025	1900	62.80
9.	Svedujo	6893	4185	60.71
10.	Danlando	2765	1635	59.13
11.	Jugoslavio	2629	1445	54.96
12.	Brazilo	6820	3660	53.66
13.	Norvegujo	2318	1235	53.27
14.	Usono	3352	1460	43.55
15.	Germanujo	6986	2870	41.08

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	495	465	93.96
2.	Urugvajo	330	265	80.30
3.	Kanado	345	270	78.25
4.	Japanujo	1182	885	74.87
5.	Aŭstralio	1145	775	67.68
6.	Maroko	937	540	57.63
7.	Izraelo	330	180	57.57
8.	Aŭstrujo	1485	530	53.69
9.	Islando	330	170	51.51
10.	Meksikio	250	110	44.—
11.	Sudafriko	305	110	36.06
12.	Irlando	250	55	22.—
13.	Nov-Zelando	854	175	20.49

Por detaloj pri la ĉijaraj konkursoj oni vidu la martan numeron de nia revuo. Kelkaj landoj ne sukcesis atingi 250 poentojn en la fino de 1955. Ni tamen deziris partoprenigi ilin, sed ni devis fiksi ilian kvoton je la minimumo de 250.

Ni devas atentigi ke en la stato je la 31-a de decembro 1955, aperinta en la februara numero, estis erare indikite, ke Norvegujo finis per 2142 poentoj kaj 97.3 %. La korektaj ciferoj estas: 2318 poentoj, kio signifas 105.37 %. Per tio Norvegujo ŝovas al la 20-a loko en tiu konkurso. Gratulon al niaj Norvegaj amikoj kaj pardonpeton!

NIA FORUMO

Estimata Redaktoro,

Mi bedaŭras legi la nesubskribitan, do oficialan, aserton en la februara ESPE-RANTO, ke en mia brodkasto de 15 decembro mi donis „perfektan lecionon kiel ne propagandi nian lingvon en kulturaj rondoj”.

Konsolas min du faktoj —

1. Inter la tridek gratul-leteroj kaj — -kartoj, kiujn mi poste ricevis, troviĝis karto de Vic-Prezidanto de UEA David Kennedy kaj S-ino Kennedy, sur kiu ili skribis „Gratulon pri via brodkasto!”, kaj
2. rektrezulte de la brodkasto mi ricevis inviton prelegi pri Esperanto al la Oxford University Philological Society. (Mi tion faris la 6an de februaro en Balliol Kolegio, kaj ricevis tre sinceran dankesprimon.)

Sincere via,
W. A. Gething

Estimata Sinjoro,

Kun granda surprizo mi legis la akrajn komentojn en „Esperanto” pri la radia diskuto de B.B.C., la 15an de Decembro. Mi atente aŭskultis la programon kaj mi persone opinias, ke nia reprezentanto bonege plenumis sian malfacilan taskon. Kvankam la tuta programo daŭris duonhoron, S-ro Gething devis prezenti la esencajn argumentojn por Esperanto en nur 5 minutoj kaj poste defendi tiujn argumentojn kontraŭ kritikado. Evidente neniun povus kontentige prezenti ĉiujn aspektojn de la afero sub tiaj kondiĉoj. Krome, s-ro Gething klarigis en la Londona Klubo, ke la originala diskuto daŭris 45 minutojn kaj B.B.C. poste mallongigis ĝis 30 minutoj.

Mi konsentas, ke li ne sufiĉe akcentis la valoron de Esperanto al intelektuloj kaj internaciaj rondoj. Eble li eĉ neintence donis impreson, ke nur simplaj nekleraj homoj bezonas ĝin. Sed diri, ke „ni ricevis perfektan lecionon, kiel ne propagandi nian lingvon en kulturaj rondoj”, estas nejuste kaj neĝuste. Malmultaj esperantistoj kapablus tiel firme sed ĝentile pritrakti la sensciajn kritikojn de la du „intelektuloj”. Krome, ne temis pri propagando en kultura rondo — la dissendo estis absolute publika kaj celis ĉefe la ordinaran, meze kleran aŭskultanton.

La komento de S-ro Gething pri poetoj evidente estis iom ŝerca. Li tute honeste konfesis, ke li ne mem interesiĝas pri la poezio, sed li diris, ke tiuj, kiuj havas rajton juĝi, alte taksas la esperantan poezion.

Se la menciita artikolo aperus en „British Esperantist” super nomo de la aŭtoro, ĉio estus en ordo. Sed ĝi fakte aperis en nesubskribita artikolo en internacia revuo, inter artikoloj pri diversaj landoj, kiuj ŝajne prezentas objektivajn

raportojn en nomo de U.E.A. Tial mi esperas, ke vi iamaniere povos klarigi al eksterlandaj legantoj, ke la opinioj esprimataj en ĝi ne estas akceptitaj de ĉiuj, kiuj aŭskultis la dissendon.

Tion dirinte, mi kaptas la okazon gratuli vin pri la alloga aspekto de la nuna revuo „Esperanto”. Precipe plaĉas al mi la bela nova kovrilo, ĉar dum jaroj mi ne estis kontenta pri la malnovaj.

Sincere via,
W. G. Atkinson

Via opinio pri la radio-elsendo de Gething ŝajnas al mi prava. Estas diskuteble, ĉu utilas kritiki la faritan fakton tiel detale en publika gazeto (anstataŭ ĝin sendi private al B.E.A.). Eble jes, ĉar la afero havas ankaŭ principan flankon, kaj estas grave, ke ni klopodu eviti en estonto tiel lamajn defendojn de nia afero.

Komprenble oni ne povas ĉion postuli de homo starigita antaŭ mikrofono, kaj mi supozas, ke Gething mem estas diversrilate nekontenta pri sia prezentado. Estas tamen necese akcenti, ke bonvola diletantismo ne plu sufiĉas por propagandi Esperanton; oni devas posedi kaj doni la faktojn. Nu, al mi ŝajnas, ke la du oponentoj de Esperanto estis „facila ĉaso”. Kiam oni havas la aplombon aŭ stultecon aserti, ke ne ekzistas lingva problemo, aŭ ke Esperanto ne taŭgas por esprimi la sentojn (Ho mia kor’ — la esperantistaj geedziĝoj!), oni devas ne domaĝi la refutadon. Gething pro ĝentilemo kvazaŭ sufokis la faktojn. Kiam oni demandis, ĉu iam okazis esperantlingva konferenco, kiu pritraktis neesperantajn aferojn, kial li ne citis la fervojistajn kongresojn? Kaj prisilenti la

agnoskon de Unesko estis vere nepardonoble.

Mi renkontis esperantistojn, kiuj esprimis kontenton pri tiu elsendo. Por mi tio pruvas nur, ke ankaŭ ili estas nekompetentaj pri la afero Esperanta.

Reto Rossetti

LA PREZIDANTO DE UEA:

Mi ricevis de BEA leteron, en kiu tiu asocio protestas kontraŭ artikolo en la februara numero pri radiodissendo, artikolo verkita de la redaktoro pri mondaj novaĵoj sub la rubriko „Tra la mondo esperantista”.

Mi opinias, ke la redaktoro estas libera presigi aktualajn novaĵojn kaj laŭdi aŭ kritiki laŭ sia propra bona prijuĝo, aparte kiam temas pri aferoj en lia propra lando, Britujo. BEA en sia letero mencias, ke multaj britoj konsideris la artikolon atako kontraŭ la brita movado. Principe UEA opinias, ke kritiko kontraŭ izolita afero aŭ kontraŭ la agado de iu persono ne signifas atakon kontraŭ la landa asocio mem. Se ni akceptus tiun principon, ni venus al absurdaj konsekvencoj.

Pri la koncerna radiodissendo mi persone ne havas opinion, ĉar mi ne aŭskultis ĝin. Nur nun mi eksciis, ke la Esperanto-pledanto estis mia bona amiko S-ro Gething, eksprezidanto de BEA, bone informita pri esperantaj aferoj. Sed komprenble li kaj kiu ajn alia povas pro nervostreĉo malsukcesi en iuj detaloj, aparte se oni troviĝas antaŭ mikrofono en libera diskuto sen manuskripto.

E. Malmgren.

HONORIGO DE NIA ĜENERALA SEKRETARIO

La pacunuiĝo de Stockholmo (*Stockholms Fredsföreningen*) aljuĝis sian lingvopremion de 1.000 svedaj kronoj por la jaro 1955 al Prof. D-ro Ivo Lapenna pro liaj meritoj en la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj ĉefe pro lia laboro dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Tiu ĉi disdono okazis nun la kvinan fojon, sed estas la unua fojo, ke ĝi estas aljuĝita al eksterlandano. Dum Pentekosto D-ro Lapenna veturos al Stockholm por ĉeesti persone la ricevon de la premio kaj fari en la Pacunuiĝo la kutiman paroladon.



La plej multe disvastigita tagjurnalo de Finnlando, „Helsingin Sanomat”, enketis siajn legantojn pri la demando, kiu persono en aŭ eksterlanda meritis la titolon „Nomo de la jaro”. La rezulto estis presita en la numero de la 31a de decembro 1955. Jen la nomoj en la ordo de voĉkvanto:

1. J. K. Paasikivi, la prezidanto de la respubliko de Finnlando;

2. Jean Sibelius, mondfama komponisto, 90-jara;

3. Margaret Rose, brita princino;

4. V. Äinö Linna, verkinto de „Nekolata Soldato”, la plej vendita verko de la lasta jaro en Finnlando;

5. Ivo Lapenna, reprezentanto de UEA en Montevideo;

6. Mirva Arvinen, belulina „princino”;

7. Urho Kekkonen, la plej pridebatita kandidato por la prezidanta posteno;

8. D. Eisenhower, prezidanto de Usono;

9. K. Adenauer;

10. N. A. Bulganin;

11. N. S. Hruŝĉev;

12. J. Nehru.



Al D-ro Lapenna nian plej varman gratulon!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de marto 1956

N-ro 281

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de februaro 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	760	4486
Individuaj membroj		
MJ	410	574
MA	2348	3167
MS	492	592
Pat.	7	9
DM	284	289
HM	57	54
	<u>3598</u>	<u>4685</u>
	<u>4358</u>	<u>9171</u>

NOVA ĈEFDELEGITO:

Pollando

Sakowicz, S-ro Roman, advokato, Skrytka 26, NOWA SOL (Silezio).

DELEGITOJ:

Alĝerio

Alger, D: S-ro Paul Tournon, B.P. 122, Alger. Tel. loĝejo; 722-45, oficejo: 677-64.

Maison-Carrée, D: S-ro Féodor Jelenc, gimnazia instruisto, 24, rue de Gascogne. FD (Naturscienco): La D.

Aŭstralio

Bacchus Marsh (Vic.). D: S-ro Frank Halls, edukisto, Northcote School. Tel. Bacchus Marsh 4.

Aŭstrujo

Innsbruck, FD (Literaturo, Ĵurnalismo): S-ro H. Königstedt, Gumpstr. 61. FD (Policaĵ aferoj): S-ro Walter Lager, kriminalpolica inspektoro, Lutterottstrasse 2. Tel. (oficejo) 6161.

Klosterneuburg, D: S-ro F. W. Ebner, komercisto, Markgasse 5. Tel. 13 69.

Wien, FD (P.T.T.): S-ro J. Janecka, poŝtisto, Diemgasse 3/14. Tel. A-26-2-34.

Belgujo

Braine-le-Comte, FD (Sociaĵ Aferoj): vakas.

Bruxelles 3, FD (Filatelo): S-ro Victor Lamberts, inspektoro, 62, Avenue Ernest Renan.

Brazilo

Caratinga, FD (Komerco): S-ro E. C. Moreira, komercisto, Av. Olegario Maciel 90, Caixa Postal 230.

Britujo

Bristol, FD (Fervojoj): S-ro Frank Curtis, anstataŭanta staciestro, 18, Church Road, Hanham.

London, FD (Juro): Prof. D-ro Ivo Lapenna, Jura konsultisto, 77, Grasmere

Avenue, Wembley, Middlesex. Tel. ARNold 9081.

Purton, D: vakas.

FD (Fervojoj): vakas.

Southampton (Hants). D: vakas.

FD: vakas

Bulgarujo

Sofia 29, FD (Ekonomia geografio): S-ro C. Murgin, kvartalo Malčika 41.

Ĉeĥoslovakujo

Praha 10, FD (Sciencaĵ aferoj): D-ro Jaromir Jermár, Jablonová 23. Tel. 922267.

Trebič, FD (Instruado): S-ro Th. Kilian, Pricni 318.

Danlando

Viborg, VD: vakas

Finnlando

Korso (Uudenmaanlääni). D: vakas.

Muurla (Turun ja Porin lääni). D: S-ro Esko Kyöstila, instruisto, Tel. Muurla 15.

Nurmes (Kuopion lääni). D: Vakas.

FD (Bibliotekaj aferoj): vakas

Turku (Turun ja Porin lääni). VD: S-ro Pauli Riihivaara, Tuureporinkatu 12 B 17. Tel. 24641.

Tyrvää (Turon ja Porin lääni). D: vakas.

Francujo

Arles-sur-Rhône (Bouches du Rhône). VD: S-ino Marie Blary, 9, rue Jean Jaures. Tel. 11-42:

FD (Instruado): La VD.

Bar-le-Duc (Meuse). FD (Skoltismo): S-ro Pol Denis, instruisto, „Suna Dometo”, Chemin de Blamecourt.

Dieppe (S. Maritime). D: vakas.

Hyères (Var): FD (ĝardenkulturo). S-ro Pierre Métivier, Boîte Postale 51.

Istres (Bouches du Rhône): D: vakas.

Menton (Alpes Maritimes). D: S-ro Al-mire Thommerel, 46, rue Pietra-Scritta. FD (Turismo): La D.

Mont de Marsan (Landes). D: S-ino Simonne Combebias, Le Baradé.

Oulchy le Château (Aisne). D: S-ro A. Perrin, 12, Avenue de la Gare.

Germanujo

Fulda (Hessen). D: S-ro Heinrich Funk, emerita kontorestro, Haimbacherstr. 35. VD: S-ro Otto Mehler, prokuristo, Josefstrasse 13. Tel. 2638.

Herford (Westfalen). D: S-ro H. Otterpohl, Annastr. 1. Tel. 3702 (dumtage).

Niedermarsberg (Westfalen). FD (Bankaj aferoj): S-ro Franz Schneider, bankisto, Hauptstrasse 33. Tel. 252.

Hispanujo

Barcelona, FD (Turismo): S-ro B. Bonet, str. Conde del Asalto 177-pral-1a.

Hungarujo

Budapest, D: S-ro Lajos Hattyár, fotografo, XIII Menyasszony-u. 58. Tel. ptm. 122-319.

FD (fotografado, filmo): la D.

FD (pacmovado): S-ro Pál Balkányi,

bankoficisto, Magyar Nemzeti Bank,

V. Szabadság-tér 8. Tel. 310-950/1452.

FD (Filatelo): D-ro Vince Tóth, Szépvölgyi u. 62.

Gomba (Pest m.). D: S-ro László Tóth, profesoro.

FD (Pacaferoj; pedagogio): la D.

Miskolc (Borsod vm.). VD: S-ro István Temesi, fervoja oficisto, telep. 26/4. Tel. 16-023.

FD (Pacmovado; fervojoj): La D.

Italujo

Bologna, FD (Studentaj aferoj): vakas.

Genova, D: S-ro F. Basso, komerca reprezentanto, Salita Aquila 1-2.

Parma, FD (kulturaj aferoj): S-ro Guglielmo Capacchi, instruisto. Via Nino Bixio 87.

Izraelo

Ramat Ĥajal (apud Tel-Aviv). D: S-ino Raĥel Blajman-Ben-Ŝalom, flegistino, edukistino, Reĥov Revadin 1.

Japanujo

Nisibiwazima (Aiti-ken). D: S-ro Ĝ. Takenaka, 28, Zikken'ura. Tel. 24-1511

Ootu-si (Siga-ken). D: S-ro Masao Ossaka, kuracisto, Kamibambatyō 1. Tel. Ootu 3007.

Osaka (Osaka-fu). FD (Instruado): S-ro Rinzo Okumura, instruisto, ĉe Ikuno Altlernejo, Ikuno. Tel. 77-0415.

Sendai (Miyagi-ken). D: Prof. R. Ura. Anatomia Instituto, Medicina Fakultato de Tohoku Universitato, Kitajobanĉo. Tel. 3173.

Jugoslavujo

Jajce (Bosna i Herceĝ.). D: S-ro P. Momir, vicprofesoro. Gimnazio.

Jegunovci (Nr Makedonija). D: S-ro Metodi Garev, seruristo, s. Jegunovci Tetovsko NRM.

Kanado

London (Ontario). D: F-ino Maria-Rosa Impanis, flegistino. 42, Adelaide.

Nederlando

Arnhem. D: S-ro H. Arends, meblisto, Gravenstraat 16.

VD: S-ro E. J. Woessink, impostkonsilanto, Vondellaan 47. Tel. 21256 (oficejo: 20373).

Geleen. D: vakas.

Leeuwarden. VD: vakas.

Zwolle. FD (medicino): D-ro G. J. van Lookeren Campagne, kuracisto, Groot Weezenland 38. Tel. 5021.

Sud-Afriko

Pietermaritzburg (Natal). VD: S-ro S. de Waal, Texel 39. Tel. 28766.

FD (konstruado): la VD.

Svedujo

Limhamn (Malmö, Skåne). D: S-ro Bror Lundström, oficisto. Tegnérsgatan 58. Tel. Malmö 54752.

Norrahammar (Småland). VD: vakas.

Ystad (Skåne). D: S-ino Karla Olsson, Regementsgatan 17. Tel. 13175.

VD: S-ro Inge Johansson, Box 30, Rydsgård. Tel. 44312.

Svislando

Genève. FD (Konsulaj aferoj): vakas.

Niederhelfenschwil (St. Gallen). D: S-ro H. Traber, studanto. IM Hegiberg. Tel. (073) 4'92'26.

Tunizio

Tunis. D: vakas.

Usono

Andersson (Indiana). D: vakas.

FD (protestanta kristanismo): vakas.

Arlington (Calif.). FD (Matematiko): S-ro W. H. Koehn. P.O. Box 655.

Brookline (Mass.). D: S-ro J. A. Fitzmaurice, 51, Columbia Street.

Hackensack (Minn.). FD (kriptografio): S-ro B. L. Hanson, instruisto. Tel. 4-F-3.

Hartford (Conn.). D: S-ro S. E. Kittredge, asekura oficisto. 757, Maple Ave. Tel. JA 7.6907.

Hillsboro (Oregon). D: S-ro A. Hughes, presisto. 476 S. Bailey Ave.

Los Angeles (Calif.). FD (Literaturo): S-ro F. J. Ackerman, literatura agento. 915, South Sherbourne Drive. Tel. CRestview 4-2762.

NOVAJ KOMITATANOJ:

1. **Goodes**, S-ro W. M., 7 Osborne Close, Hornchurch, Essex, Britujo.

2. **Jaumotte**, S-ro Maurice G. D., De Bruynlaan 44, Wilrijk-Antwerpen,

PATRONO 1956:

9. E. Olsson, Heby, Badabruk, Svedujo, Belgujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956:

333. Blokpoel, s-ro H. J., Rotterdam, Nederlando.

334. Boelsma, s-ro P. A., Haarlem, Nederlando.

335. Dijk, s-ro J. P. van, Oosterland, Nederlando.

336. Douma, f-ino J. S., Deventer, Nederlando.

337. Geerlings-la Croix, s-ino M. C., Amsterdam, Nederlando.

338. Hoekma, s-ro A., Den Haag, Nederlando.

339. Jong, s-ro G. de, Huizum, Nederlando.

340. Laverman, f-ino A., Leeuwarden, Nederlando.

341. Lookeren Campagne, d-ro G. J. van, Zwolle, Nederlando.

342. Mabesoone, s-ro P. M., Amsterdam, Nederlando.

343. Mook, s-ro W. H., Groningen, Nederlando.

344. Ouwehand, s-ro D., Den Haag, Nederlando.

345. Pannenburg, s-ro R., Nieuwe-Pekela, Nederlando.

346. Postma, f-ino T., Rotterdam, Nederlando.

347. Ravestein-Basters, s-ino J. M., Den Haag, Nederlando.

348. Roelofs, s-ro J. J., Soest, Nederlando.

349. Roelofs, d-ro W. P., Soest, Nederlando.

350. Slot, s-ro R., Zeist, Nederlando.

351. Woessink, s-ro E. J., Arnhem, Nederlando.

352. Zorgdrager, f-ino C., Amerongen, Nederlando.

353. Birch-Olsen, s-ino Sigrid, Greaker, Norvegujo.

354. Boneid, s-ro Storm B., Horten, Norvegujo.

355. Bugge-Paülsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo.

356. Caspary, s-ro H., Oslo, Norvegujo.

357. Falch, s-ro Aage, Kragerø, Norvegujo.

358. Fygle, s-ro Bjørn, Bodø, Norvegujo.

359. Jensson, s-ro Arnfinn, Oslo, Norvegujo.

360. Kjøningsen, s-ro Ragnar, Sarpsborg, Norvegujo.

361. Maarli, s-ro E., Bodø, Norvegujo.

362. Madsen, s-ro L., Kapp, Norvegujo.

363. Nesje, s-ro Hans, Aalesund, Norvegujo.

364. Norvall, s-ro Knut, Oslo, Norvegujo.

365. Reisaeter, s-ro Trygve, Odda, Norvegujo.

366. Resberg, s-ro Thure, Sarpsborg, Norvegujo.

367. Ringsted, s-ro G., Torp, Norvegujo.

368. Rosbach, s-ro Hans A., Havik, Norvegujo.

369. Rosbach, s-ro Johan H., Sarpsborg, Norvegujo.

370. Selbekk, s-ro John, Oslo, Norvegujo.

371. Støp-Bowitz, s-ro C., Oslo, Norvegujo.

372. Tveit, s-ro M., Stavne, Norvegujo.

373. Vik, s-ro Vidar, Alvim, Norvegujo.

374. Vilke, s-ino Olga, Oslo, Norvegujo.

375. Clarkson, s-ro R. J., Tauranga, Nov-Zelando.

376. Azevedo, s-ro Celestino de, Vila Real, Portugalujo.

377. Lino, s-ro Teixeira, Fundao, Portugalujo.

378. Oliveira, s-ro B. A. S. O. de, Lisboa, Portugalujo.

379. Feis, s-ro Günter, Altenwald, Sarlando.

380. May, s-ro Johannes, St. Wendel, Sarlando.

381. Seubring, s-ro G. Pieter Maritzburg, Sud-Afriko.

382. Woodruff, s-ro E. W., Johannesburg, Sud-Afriko.

383. Ahlgren, s-ro A., Göteborg, Svedujo.

384. Andersson, s-ro Lars, Hoje, Svedujo.

385. Colliander, s-ino M., Hägersten, Svedujo.

386. Dahl, s-ro Einar, Uddevalla, Svedujo.

387. Ekblom, f-ino Anna, Boden, Svedujo.

388. Ericson, s-ro A., Sködinge, Svedujo.

389. Julin, s-ro Teodor, Stockholm, Svedujo.

390. Linder, s-ro Karl H., Stockholm, Svedujo.

391. Malmkvist, s-ro A., Visby, Svedujo.

392. Olsson, s-ro Olle, Lund, Svedujo.

393. Olsson, s-ro Sture, Strömsnäsbruk, Svedujo.

394. Wallberg, s-ro Joel, Torsäker, Svedujo.

395. Grutter, s-ino L., Samedan, Svisujo.

396. Barbieri, s-ro Rubens A., Montevideo, Urugvajo.

397. Garcia, s-ro Rodolfo, Montevideo, Urugvajo.

398. Heimann, d-ro Walter, Montevideo, Urugvajo.

399. Klein, s-ro Alfredo, Montevideo, Urugvajo.

400. Morales, d-ro R. Zeballos, Florida, Urugvajo.

401. Pons, s-ro Valdo E., Colonia, Urugvajo.

402. Ballard, s-ro Bernard C., Camarillo, Usono.

403. Ballard, d-ro Francis E., Reseda, Usono.

404. Buchheim, s-ro Walter A., Denver, Usono.

Ĉu vi iros a la kongreso en Kopenhago?

Se jes, ekiru unu semajnon antaŭe por ĉeesti la internaciajn somerajn ferian kursojn 28/7—4/8 en

HELSINGØR

kiu situas unu vagonaran horon norde de Kopenhago. Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

405. Dormont, s-ro L., Brooklyn, Usono.
406. Eisele, s-ro J., St. Louis, Usono.
407. Futran, s-ro John, New York, Usono.
408. Hannum, s-ro Robert W., Desert Springs, Usono.
409. Neuendorffer, f-ino Ruth, North Tarrytown, Usono.
410. Papworth, s-ro A. J., East Cleveland, Usono.
411. Poehlmann, s-ro Oscar, Detroit, Usono.
412. Sharpe, s-ro L. A., Chapel Hill, Usono.
413. Sievers, s-ro E., Detroit, Usono.
414. Smart, s-ro H. W., Brooklyn, Usono.
415. Van Hill, s-ro B., Madeira Beach, Usono.
416. Vedder, s-ro Frank W., Miami, Usono.
417. Ziegenhagen, s-ro Alvin, Poy Sippi, Usono.
418. Jelenc, S-ro Féodor, Alger, Alĝerio.
419. Burstin, S-ro S., Melbourne, Aŭstralio.
420. Collier, S-ro John, Newdegate, Aŭstralio.
421. Taylor, S-ro F. C., Albury, Aŭstralio.
422. Halbedl, D-ro Adolf, Knittelfeld, Aŭstrujo.
423. Schmidt, Pastro Anton, Graz, Aŭstrujo.
424. Boeren, S-ro M., Antwerpen, Belgujo.
425. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo.
426. Thaey, S-ro P., Oude God, Belgujo.
427. Vermandere, S-ro G., Antwerpen, Belgujo.
428. Aitchison, S-ro George R., Northampton, Britujo.
429. Bevan, S-ro G., Wrexham, Britujo.
430. Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Britujo.

431. Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Dorset, Britujo.
432. Bowell, F-ino B., Bristol, Britujo.
433. Cunningham, S-ro W., West Wemyss, Britujo.
434. Faux, S-ro Derrick P. Bridgnorth, Britujo.
435. Harvey, S-ro John, Glasgow, Britujo.
436. Millidge, Pastro R. G., Surrey, Britujo.
437. Morris, S-ro W., Birmingham, Britujo.
438. Paul, S-ro Robert, Edinburgh, Britujo.

DONACIOJ AL LA ĜENERALA KASO:

R. Barta 1,90 gld.; D-ro R. Maraury 7,20 gld.; D-ro W. A. von Nimitz M.D. 3,81 gld.; A. F. Doneis 11,43 gld.; A. Nikolajevic 3,80 gld.; S-ino M. Gatter 2,71 gld.; D-ro W. Treude 1,81 gld.

DONACIOJ AL LA FONDAĴO-MONTEVIDEO:

D-ro R. Maraury 7,20 gld.

DONACIOJ AL FONDAĴO-EKSPOZICIO:

Sekcio Amersfoort L.E.E.N. Nederlando 8,35 gld.; S-ro E. J. Woessink, Nederlando 10,— gld.; S-ino A. Hetterschijvan Duyn, Nederlando 10,— gld.; S-ro E. Olsson, Svedujo 57,30 gld.; S-ro R. Lecocq, Francujo 5,40 gld.

Sarlanda Esperanto-Asocio 32,40 gld.; Loka Esperanto-Grupo Friedrichsthal, Sarlando 10,40 gld.

DONACIOJ AL LA AGADO PROKSIMA ORIENTO (A.P.O.):

E. Sonnenfeld 30,— gld.
Al ĉiuj donacintoj nian plej koran dankon.

RIMARKO PRI LA STATISTIKO.

Post rigora kontrolado kaj laŭlanda nombrado de ĉiuj Honoraj kaj Dumvivaj Membroj ni konstatis, ke la ciferoj en la jara statistiko aperinta en la marta numero, ne estas tute korektaj. Eble, dum la jaroj, ne ĉiam estis notitaj en la statistiko ĉiuj forpasoj kaj translokiĝoj al aliaj landoj. La ciferoj, kiuj ŝajnas al ni korektaj en al nuna momento laŭ la trovitaj detaloj en niaj sliparoj, aperas en la statistiko de tiu ĉi Oficiala Informilo. La nomoj aperos, kiel kutime, en la jarlibro.

JARLIBRO 1956.

Oni febre laboras pri ĝi. Kiel anoncote, ĝi aperos en la printempo. Ni esperas ke tre baldaŭ post legado de tiuj ĉi linioj vi havos ĝin en la manoj. Ni petas indulgon de la malpacienuloj. Ni konsolas nin, ke en la pasinta jaro eĉ sen translokiĝo de la oficejo okazis simila prokrasto.

BILDO DE ZAMENHOF

Okaze de la 14-a de Aprilo ni deziras aranĝi belan decan montrofenestron omaĝe al la Majstro. Sed vidu, ni estas devigitaj meti en ĝian centron nur tre simplan foteton, ĉar mankas en la tuta oficejo de U.E.A. bona digna bildo de Zamenhof. Tio estas bedaŭrinda, ankaŭ ekster memortagoj. Kiu bonvola esperantisto, grupo aŭ asocio havos afablecon havigi ĝin al la Centro de nia Movado?

ADRESO DE U.E.A.

Ni petas al ĉiuj niaj korespondantoj nepre skribi sur ĉiuj leteroj la nomon „Universala Esperanto Asocio” kaj ne nur la propran nomon de la Administranto. Eendrachtsweg estas la adreso de U.E.A., ne de F-ino Vermaas. Leteroj portantaj nur ŝian nomon sen U.E.A. ofte suferas prokraston en la liverado.

M. H. Vermaas, Administranto.

ANONCETOJ

Civilizita estas nur tiu popolo, kiu ne eliras el siaj landlimoj, armita, por estri aliajn popolojn; kaj hejme malpliigas konstante la krimfarojn, (Gandhi)

Alvoko al la Vojaĝemuloj. Ni estas du samideanoj (Radioteknikistoj) kiuj deziras fari sonoran kaj koloran filmon pri la internacia kongreso en Kopenhago; ni deziras kontakti samideanon, kiu posedas filmaparaton „Camera” kiu estas kompetenta pri la uzo de tiu aparato kaj kiu konsentos vojaĝi kun ni. Ni havos aŭtomobilon, radio-materialon, magnetofonon kaj tendon. La interesato bonvolu skribi al: S-ro Maurice Feneyrol, 15 Rue de la République, HYERES (Var) Francujo.

Poŝtkarton kun desegnaĵo kaj la vortoj „Esperanto konstruas ponton inter la nacioj” vendas Esp. grupo La Verda Kolombejo, Ciano Santa Ana, Oviedo, Hispanujo, Prezo: 10 ekzempleroj por 3 pesetoj aŭ 1 respondkupono.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, London W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

La Nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktaĵojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

La pasintan jaron Esperanto multe progresis en San Diego. Okazis la tria jarkunveno de E.L.N.A., stariĝis du klasoj por lerni Esperanton en la vespera lernejo; la gravaj ŝoseoj kondukantaj al San Diego havas vojflankajn reklamilojn; naskiĝis la Esperanto Societo de San Diego; bonegaj artikoloj en la ĵur-

nalo multege helpis. Bonvolu skribi al la San Diego Evening Tribune, 919 — 2nd Ave. San Diego, gratulleterojn en Esperanto pro la bonega publikigado de informoj pri Esperanto.

La Franca sekcio de I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperantista Federacio) intencas organizi en pluraj fervojaj centroj de Francio ekspozicion de infandeseĝaĵoj, kies temo estos „La Fervojoj en la Mondo”. La desegnaĵoj, preferinde koloritaj, havos formaton 25 x 31. Ni petas speciale la geinstruistojn inviti siajn gelernantojn desegni stacidomojn, trajnojn, lokomotivojn, pontojn ktp..... kiel ili vidas ilin en siaj landoj. Tiu ekspozicio helpos nin en nia propagando ĉe nia administracio, tial ni esperas ke ĉiuj respondos amase al nia alvoko. Franca Fervojista Esperanto Asocio, 11, rue de Milan, Paris 9°.

S-ro Katayama-Hisaaki. Literatura-fakultato, Doosisya-Universitato, Kioto, Japanio, dez. korespondi kun interesiĝantoj pri literaturo por infanoj.

Ricard Sans, Av. Tarragona 16, Vilafranca del Penedés (Barcelona), Hispanio, deziras korespondi per I.pk. tutmonde.

Ramon Bayó, Pl. Canónigo Rodó 3,3°.2a., Barcelona (Barceloneta), Hispanio, korespondas kun ĉiuj landoj.

Dudek lernantoj 12—14-jaraj de Metia Desegnlerno deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn aŭ desegnaĵojn kun knaboj samaĝaj de la tuta mondo. Certe respondos. Skribu al instruisto s-ro Silvano Manias en Azzano Decimo (Udine)-Italujo.

Alloga ĉambro por studento en Londono kun radio, gaso, k.t.p. Esperantisto po 25/- semajne. Neesperantisto po 45/- semajne. Adreso: S-ro Ph. Buttinger, 48 Ormeley Road, London, S.W.12.

19 jara studento de Milita Altlernejo volas korespondi kun la tuta mondo. Serĝento M. R. Soares, Companhia Escola de Manulengao, Strato Major Lacerda, Vila Militar, Rio de Janeiro, Brazilo.

Ses altlerneje - kleraj personoj, ĵus finintaj E-kurson, deziras korespondantojn. Skribu al: Simon Mkrtičjan, Uil. Gukasjan 19, Erevan, Soveta Armenio, Sovetunio.

Geedzoj deziras korespondi kun la tuta mondo, precipe kun Aŭstralio, M. H. Pečnik, Minahassastr. 48 bis, Utrecht, Nederlando.

La Esperanto-Societo de Hallsberg aranĝos letervesperon la 20-an de septembro. Ĉiuj gesamideanoj en la tuta mondo bonvolu sendi al ni leteron aŭ poŝtkarton. Adr. S-ro Axel Nilsson, Västra Stortgatan 35, Hallsberg, Svedujo. Ni garantias respondon al ĉiu skribinto.

Juna pola komencanto deziras korespondi kun tutmondaj geesperantistoj i.a. pri poŝtmarkoj, literaturo, ĵurnalismo, komerco. Adreso: Brezko Antoni, BIALYSTOK, ul.K.Napierskiego 11 m.1, Pollando.

Juna ĉeĥoslovaka esperantisto deziras korespondadi kun la mondo: Václav Pála, Krásné pole ĉj 313, Okres, Bilovec, Kvaj. Ostvava, Ĉeĥoslovakujo.

Wiesbaden. Bonvolu peti la novan prospekton pri tiu Internacia Kuracurbo de „Kurbetriebe der Stadt Wiesbaden“/Wiesbaden, Germanujo.

40-jara deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo garantiita. S-ro Stuart, 136 Highgate, Kendal, Westmorland, Anglujo.

Luisa Maria de Azeredo Coutinho, 12 jara, deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Rua Grão Pará 379, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Deziras korespondi kun tutmondaj esperantistoj-nepre respondos. Bianor Collett de Araujo, Rua Pedro Alves 319, Rio de Janeiro, Brazilo.

Deziras: Fotokartojn de E-grupoj en Azio, Afriko, Sud-ameriko. Donas E. kongr. poŝt-stampojn. E. Anderegg-Gurtner, Horn/Bodensee/Svislando.

Korespondi kaj interŝanĝi / afranku filatele / deziras H. Khel, Pivonková 21 24, Praha XX, Ĉeĥoslovakio.

Sveda knabo 13-jara deziras korespondi kun la tuta mondo, prefere kun samaĝuloj, pri ĉiu tento. Daniel Tarschys, Hjortstigen 3, Lidingö, Svedujo.

Al nia anonceto pri korespondado venis tiom da respondoj, ke ne ĉiuj povas ricevi korespondanton tie ĉi. Pro manko da tempo ni ne eblas respondi al tiuj, kiuj ne ricevas korespondanton, kaj tial ni prenas la okazon danki al ĉiuj alskribintoj per tiu ĉi anonceto. Tut-Rodezia Esperanto-Societo, Private Bag A I, Kitwe, Norda Rodezio.

Tramistoj-trolejbusistoj serĉas samprofesiajn korespondantojn en ĉiuj landoj. Oni skribu al: T. Arbergs, Lenina iela 338-7, Riga 6, aŭ Tramvaja un Trolejbusa Trests, Kustibas dalai — Esperantogrupa, Lenina iela 191, Riga, Latv. S.S.R.

Esperantista Grupeto. Deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn. José Pascual, Salomó 33, Buen Pastor, Barcelono aŭ Ernesto Granada, Marti Pujol 363, Badalona, Hispanio.

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj. Petu ilin, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon, de Daniel Luez, Boulevard Brossolette, Laon, (Aisne), Francujo.

Kontraŭ unu premiokuponon de U.L. aŭ kontraŭ respondkuponon mi sendos bildkarton el Usono per memorfest-poŝtmarko. Ĉiu bildkarto malsama al unu adreso. Petu iun ajn kvanton. Mendu grupe por via klubo aŭ lernantoj. Adrian Hughes, Hillsboro, Oregon, Usono.

35-jara fraŭlo deziranta labori en Venezuelo kiel mekanikisto deziras korespondi kun samideanoj tieaj. José Alfaro, str. Tetuán 91, Sabadell, Hispanujo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝtformata
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5, Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Vi legas ĉiutage en via gazeto pri nacio kaj ŝtato, suvereneco kaj federalismo, diplomatio, Homaj Rajtoj, UN, Unesko, Eŭropa Konsilantaro.....

Vi deziras, ke juro kaj justu regu inter la homoj kaj inter la popoloj.....

Vi jam estas informita, ke Unesko akceptis rezolucion pri Esperanto.....

SED ĈU VI FAKTE SCIAS

kio precize estas UN, Unesko, federalismo kaj kion vere signifas tiuj kaj multaj aliaj konceptoj kaj nuntempaj ideoj?

KLARAN RESPONDON VI TROVOS EN LIBRO,
SKRIBITA SPECIALE POR VI, POR ĈIU ESPERANTISTO

Aktualaj Problemoj de la nuntempa internacia vivo

de
Prof. D-ro Ivo Lapenna

Originale verkita en Esperanto de brila stilisto kaj mondkonata aŭtoro, la libro „majstre instruas kaj instigas al pensado“ (Scienca Revuo).

Prezo 5 guldenojn

Eldonita en Rotterdam 1952

Mendu jam hodiaŭ

ĉe via landa libroservo aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C Nederlando

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam